Midland.—A very enjoyable week-end gathering took place at Leamington Spa on July 3 and 4, when members from Birmingham and Coventry had the pleasure of meeting our Russian *samideanino* from Great Malvern, Sino Sujadinoff. After tea at the Trocadero Restaurant, we held an outdoor propaganda meeting near the Town Hall, and in spite of a drizzling rain, we sold quite a number of *Esperanto for All*. After viewing the beauties of the Jephson Gardens, we adjourned to the Blenheim Hotel for music and supper. On Sunday morning we sang "La Prego sub la Verda Standardo" and several hymns together.—F.W.H.

Spen Valley.—The members of this group, together with friends from Huddersfield and some Belgian *samideanoj*, made an enjoyable excursion to Kirklees Park on July 10. The party of about sixty also visited Kirklees Priory and Hall.

Nekrogoj.

SINJORO ÉMILE BOIRAC.

Kun la plej granda bedaŭro ni sciigas pri la morto de la suprenomita tre konata samideano jus prenita forde ni sur la kampo de batalo. Multaj britaj ĉeestintoj en la Kongresoj de Cambridge kaj Dresden ankoraŭ bone memoros tiun gajan, kleran junulon, kiun por ami estis sufice koni. Li estis la duenaskita filo de S-ro Émile Boirac, Rektoro ĉe la Dijona Universitato kaj Prezidanto de la Akademio kaj de la Lingva Komitato Esperantista. Li mortis la 15an de Majo en la tranĉeo de la "Bois d'Ailly," kie li batalis kontraŭ la germanoj, kiel subleutenanto de infanteria regimento. Li estis antaŭe jam dufoje vundita kaj revenis la trian fojon al la fronto dum la lastaj tagoj de Majo. Vundite je la 8a matene de dikega peco de haŭbizo, kiuj frakasis al li la kokson kaj la kruron, li restis kvin horojn en la tranĉeo rifuzante ĉiun flegadon de siaj kunbatalantoj kaj daŭrigante doni al ili la necesajn ordonojn por elteni ĝis la fino kontraŭ la malamikaj atakoj. Nur je la 1a posttagmeze, oni povis lin fortreni sub terura bombardardo ĝis helppostena ambulanco, kie oni faris al li la unuan bandaĝon. Portita al la Hospitalo de Commercy per aŭtomobilo de la Brita Ruĝa Kruco, li mortis tie je la 8a vespere perdinte sian tutan sangon ne nur pro sia terura vundo sed ankaŭ pro internia hemoragio.

Li estis 24-jara kaj jam de longe Esperantisto.

Antaŭ la milito, li estis oficisto en la "Credit foncier d'Algérie et Tunisie" en Paris.

Al nia altestimata samideano, Rektoro, É. Boirac, ni esprimas nian plej sinceren kondolenco.

MR. J. FENNALL.

News of the death of Mr. J. Fennall, F.B.E.A., has just reached me, and comes as a severe blow to one who knew and loved him as a fellow-worker in Esperanto propaganda in Portsmouth. To know him was to know a gentleman in the truest sense of the word; ever courteous and self-sacrificing, he was always willing to use his gifts of learning and organising ability to a good cause; to whatever he put his hand he occupied a leading place. A clever musician, a good singer, and an eloquent speaker, for Esperanto in Portsmouth he was the centre and light towards which all looked for help. His translations of English poetry into Esperanto are (in my opinion) gems. He is canonised in the hearts of all who knew him.

L. W. WRIGHT, R.N.

SINJORO SIFO.

Biografion de ĉi tiu rimarkinda homo ni ĉerpas el *La Voco de la Popolo*, ĉiusemajna Ĉina-Esperanta gazeto. Ni enmetas ĝin tute senĉange.

BIOGRAFIO DE SINJORO SIFO.

S-ro Sifo naskiĝis en la jaro 1884, en la urbo Hongsang de Ĉina provinco Kantono. Dum infaneco li estis knabo eksterordinara kaj talenta. 15-jara li farigis "Sin-Can" (unua grado de tiama lernejo-Institucio) sed ne volante esti submetota al tia sklava institucio, li memlernis diversajn praktikajn sciencojn kaj tralegis preskaŭ ĉiujn librojn. Kvankam li lernis sen gvidanto, tamen li pli profunde ellernis ĉion. 1901, kiam li estis 18 jara, soprante je la malfelico de l' popolo, kaj la putrado de l' registaro, en sia patrurbo li organizis publikparoladon, por iniciati politikan revolucion, kun tre bona efiko. Poste li lernis vojaĝante en Japanujon. Tiam, post unu jaro, Sun Jat-Sen estinte malvenkanta

je sia revolucia agado en Hue-Goū venis ankaŭ Japanujon por varbi samcelanojn en sian funkciitan "Ton-Men-Hue." S-ro Sifo ankaŭ tre helpis al li. Post nelonge, reveninte en Hinujon, S-ro Sifo redaktis progresman gazeton en Hong Kong kaj malfermis lernejon por virinoj. 1907 la revolucionoj intencis reprovi la agadon. Tiam estis unu mandareno Lee Tseng kiu de longe regis en Kantono ĉiam malhelpis al la revolucio movado. S-ro Sifo do opiniis ke antaŭ ĉio oni devas forigi tiun diablon. Iun matenon, li atendante Lee Tseng sur la vojo, kie la lasta trapaso kunportis pulvajon; bedaŭrinde ankoraŭ ne atingante la celon, la kunportajo eksplodis. Pro tio vundiĝis S-ro Sifo sur siaj membroj, kapo kaj brusto. La arrestistoj sendis lin senkonsci(enc)an al hospitalo. Post ĉirkaŭ unu monato oni forigis lian maldekstran brakon kaj resanigis lin. Kompreneble li estis jugata en juĝejo. Kvankam per preteksto S-ro Sifo defendis sin, sed pro suspekto tamen li estis malliberigata. En malliberejo, plivere infero, li verkis projekton pri "reformo de malliberejo" dank' al sia sperto. Tralegante la verkon, estis mirigata la urbestro pro la talento de S-ro Sifo, kaj per tio oni redonis al li la liberon.

En malliberejo S-ro Sifo restis tri jarojn, tamen kun nenia malĝojo, male li verkis libron pri "Dialekto de Kantono" kiun eĉ famaj lingvistoj ne povas ne admir. Elirinte el malliberejo, li restis en Hong Kong, kaj kun samideanoj funkciigis grupon por insida mortigado. En la jaro 1911 ĝia ano Lin Kuan-Si jetis bombon al Lee Tsen kaj li mem volis en Pekino, mortigi Manĉurian Princon "Tron-Pretektanto," Haltante en Ŝanhajo, kiam la Manĉuria imperiestro abdikis, li trovis la bonsancon por propagandi la Ideon kaj revenis Kantnon fondi "Fui-Min" lernejo (kokokrio en mallumo).

Pli antaŭe kiel oni scias, hinaj lernantoj-anarhiistoj en Eŭropo, en la jaro 1907 eldonis gazeton hinlingvan "La Novaj Tempoj" en Parizo. En ĝi estas diversaj tradukoj pri la Ideo, de multaj anarhiistoj: Bakunin, Kropotkin, k.t.p. Sed enporti en Hinujon estis malfacile, "Fui-Min" do el "La Novaj Tempoj" kolektante plej bonajn artikolojn presis malgrandajn broshurojn, kiuj estis efike disvastigataj, kiel sola semo de anarhiismo en Hinujo.

1912 S-ro Sifo fondis "Esperantistan Grupon" kaj baldaŭ estis Vice-delegisto de U.E.A. 1913 Somere, kiam la enlanda milito okazis en Hinujo, li indignis, per sia propra okulo vidante la krimon de militistoj, kaj forte atakis la militarismon en la artikoloj kiuj estis presitaj Esperante kaj fine en la revuo *La Voĉo de la Popolo*, N-roj 1, 2. Pro tio "La Voĉo" nove naskita estis malpermesata kaj S-ro Sifo forkuris de danĝera persekuto al Macao kie regas Portugaloj. Sed la lastaj konsentante kun hinaj registoj ree malhelpis al li eldoni la revuon. Tial post duonjaro pasigante tre malfacilan horon "La Voĉo" reaperis ĝis nun. En Julio de la sekvinta jaro, revenante fondis la "Grupon de Anarhiist-Komunisto" en Sanghajo. Per tio influo igis enlandajn samideanojn kiel sekvo, fondi en siaj regionoj grupojn kaj propagandeojn por la celo.

S-ro Sifo estis kuraĝa, tolerema, decidema kaj diligenta. Li eldonis "La Voĉon" kun nenia monrimedo kaj malmultaj kunlaborantoj. Li do samtempe estis redaktoro administro kaj presisto, sed nenion li timis. Cetere li estis malsanema, tial kiam ĉiu numero de "La Voĉo" aperis, senescepte li malsaniĝis. Gis kiam iom li estis resaniganta li laboris ree kiel antaŭe. Kompreneble per tio li konsumis ian junan vivon. Kiam li malsanĝis, la malriĉeco ne permesis venigi kuraciston. Oni petis ke vendu la presmašinon (*La Voĉo* estas propramane presita). Sed li rifuzis pretekstante ke tiu ĉi maŝino preskaŭ estas la sola vivfonto de nia ideo en Oriento. Estus malutile por savi unu

personon vendi ĝin. Pli poste per helpo de amikoj li estis en hospitalo, sed ho ve! tro malfrue, la malsano estis sen rimede forigota kaj je la 27a de Marto, 1915, dekan matene S-ro Sifo forlasis la teran vivon 31 jaran.

S-ro Sifo adoris de L. Tolstoj, ne nur scion sed ankaŭ moralecon. Kun samideanoj li fondis la grupon "Konscienco" kies principio estas:—(a) kontraŭ viando, (b) kontraŭ alkoholo, (c) kontraŭ tabako, (d) kontraŭ sklaveco, (e) kontraŭ homveturilo, (f) kontraŭ edzeco, (g) kontraŭ familieco, (h) ne ŝtatoficistigo, (i) ne deputatiĝo, (j) ne politikpartianigo, (k) ne militistiĝo, (l) kontraŭ religio.

Dum la lasta malsanego kuracisto admonis lin manĝi viandajon por helpi la forton de la korpo, sed li rifuzis ĝis morto.

K. C. SAN.



Libraro kaj Gazetaro.

Artikoleto de Ro So, pg. 130, en nia lasta numero. La legantoj bonvole notu la jenajn du preserarojn pro forlasitaj literoj:—Linio 8, Malfermite devas esti *Malfermine*; linio 15, Pakonferenco devas esti *Packonferenco*.

Kion pensas Neŭtraluloj pri la Milito.—Nova 4-paĝa folio, eldonita de la komitato "Por Francujo, per Esperanto," 51, rue de Clichy, Paris.

Gazetoj Ricevitaj.—*Amerika Esperantisto* (June—July).

Bulletin d'Information Esperantisto (Avril et Mai) en la franca lingvo kaj Esperanto. Tiu ĉi gazeto estas absolute sendependa de ĉiu organizo, grupo aŭ societo Esperantista. Ĝi celas nur la anstataŭon de la francaj Esperantaj gazetoj ne aperantaj dum la milito. La unua numero liveras sciigojn pri la morto sur la batalejo de niaj samideanoj, la Kapitano Martin, M. Émile Boirac, sub-Leŭtenanto de infanterio, la dua filo de M. Émile Boirac, rektoro de la Universitato de Dijon kaj Prezidanto de la Lingva Akademio kaj Komitato, kaj de kelkaj aliaj. Sur pg. 8 S-ro Ch. Schriewer, belga soldato, skribas, "Mi havas la plezuron admirri ĉi tie la belan aŭtomobil-ambulancon, 'Esperanto No. 1,' kun la bela Verda Stelo. Ĝi multe propagandas inter la soldatoj."

Germana Esperantisto (Junio A—B).

Esperanto Monthly (July—August).—Children's number, *Esperanto for the Bairns*. Contains many interesting articles for children and their teachers:—"Esperanto and the Child," by the Editor; "Esperanto and the Natural Language," by L. H. Leadley; "Esperanto por Junaj Infanoj," de F-ino H. Cotton; two amusing rhymes in Esperanto by M. C. Butler and Clarence Bicknell; Monologo por Juna Knabino, de Louise Briggs, Translator's Corner, etc.

Japana Esperantisto (25 Majo) en la japana lingvo kaj Esperanto.

Korespónda Kurso, Memlernilo de Esperanto por hino, No. 21. La numero enhavas specimenojn de la Esperanta literaturo kune kun hinaj tradukoj el la Psalmo, Sentenco, Lingvaj Respondoj, k.t.p.

La Espero (Junio).—Organo de la Sveda kaj Norvega Esperantaj Societoj.

Kataluna Esperantista (Julio).

La Holanda Pioniro (Julio).

La Ondo de Esperanto (Junio) el Rusujo.

Bungei-zassi Akatuki (Tagigo, gazeto de la japana literaturo), ĉiunmonato 12-paĝa, redaktita en la japana lingvo (presliteroj romanaj kaj hinaj). Jarabono, Sm. o. 78 afrankite, eldonejo, Hakkozijo; Romagi-Akatuki-Sya, Tokyo Sugamo, Japanujo.

Nederlanda Katoliko (Julio).

"Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia."—This remarkable article—one of the many good things which appear in the *Fundamenta Krestomatio*—was written about thirteen years after Esperanto was first given to the world. The name of its author (whom we now know to be no other than Dr. Zamenhof himself) was for long hidden under the *nom de plume* "Unuel." Every English-speaking student of Esperanto—whether he has the *Krestomatio* or not—ought to have a copy of this powerful treatise in the form in which it has been published as a separate book at the *Review of Reviews* Office (the price is only 6d.). It contains not only the original article, but also a masterly translation by Mr. Wackrill, each page of which faces the corresponding page of the original. Mr. Wackrill has done many good things in the way of translation, but it is doubtful whether anything better from his pen has ever appeared than the piece of work contained in this publication. It is a perfect model of what translation should be; not too much fettered by a slavish following of the exact wording of the original, but at the same time containing its essence and spirit, and appearing in itself to be an original work, with all the vigour and freshness coming from a perfect mastery over, and untrammelled liberty in using, the English language.—W.M. HARVEY, from *Esperanto Monthly*.

Internacia Bulteno, Germana informilo pri la milito. Aperas duonmonate. Abonprezo 2 Sm. jare. Eldonita de "Germana Esperantoservo," Berlin, S. 59.—Tiu Esperantistoj, kiuj kredas, ke la grandegaj kaj superaj antaŭlaboroj de la organizintoj de la *Deka Kongreso* estas faritaj tute vanaj, certe eraras, malgraŭ tio, ke la kongreso ne okazis. Almenaŭ la presita nomaro de partoprenontoj servis al la germanaj eldonistoj de la supre citita gazeto kiel taŭga kaj konfidinda adresaro de ĉiulandaj — plejparte spertaj Esperantistoj. Kvankam versajne la Parizaj Esperantistoj ne faris sian penon por tiu celo, oni devas konfesi, ke vere la agemaj germanoj ne povus trovi pli modernan liston de Esperantistoj el neŭtralaj landoj. Al tiuj lastaj la gazeto komence estis sendata senkoste. Nuntempe oni jam ĉesis la senpagan sendadon. La *Bultenoj* estas ilustritaj kaj tre zorge redaktataj. Pro la enhavo tamen, oni ne bezonas ĝin aboni. Plejparte ĝi enhavas tradukojn de oficialaj dokumentoj, kiuj preskaŭ ĉiuj jam aperis en nia gazetaro. Cetere la germana vidpunkto pri la milito estas klarigata kaj defendata. Kompreneble, sed tamen mi ne kredas, ke la lasta numero (15a de Junio) konyinkos multajn neŭtralajn Esperantistojn pri la neceso por dronigi centojn da senkulpa pasageroj sur la ŝipo *Lusitania*.—H.D.—El *Nederlanda Katoliko*.

Postuli, ke iu memoru ĉion, kion li legis, egalvaloras postulon, ke li konservu ĉion, kion li povis manĝi. Li vivis fizike de la nutraĵo, li vivis spirite de tio, kion li legis, li do fariĝis tio, kio li estas. Sed same, kiel la korpo asimilas nur samspecajn elementojn, ĉiu memoras sole tion, kio lin interesas, kio estas konforma al la sistemo de liaj ideoj aŭ al liaj opinioj. Opiniojn posedas ĉiu, sed tre malmultaj homoj posedas ion similan al sistemo de ideoj. Tial ili ŝatas nenion objektive kaj el la verkoj legitaj restas al ili nenio; ili povas nenion konservi en la memoro.

Tradukis KABE,

El SCHOPENHAUER.

Muzikajoj.

La Rozario—*The Rosary*.—Muziko de Ethelbert Nevin. Eldonita de *The Boston Music Co.*, Londonaj agentoj, Schott & Co. Nova eldono, kun esperantaj kaj anglaj vortoj, esperanta traduko de F. H. Loud. Gamo D flat, por voĉo soprana aŭ tenora, amplekso E flat—F. Prezo ne montrita, kredeble 75 sd.

Ni kore bonvenigas la esperantan eldonon de ĉi tiu fama kanto. Pri la muziko mem estas superflue paroli. La traduko, se ne genia, estas almenaŭ tute kontentiga, kaj rilate la rimon, ĝi superas la originalon! Ni esperas, ke la kanto bone vendigos en sia nova formo, kaj ke aliaj muzikaj eldonejoj imitos la entreprenon de la Bostonia.

La Tagigo.—Kanto Esperantista. Poemo de Antoni Grabowski, Muziko de Baranski. Dua preso. Eldonita de J. L. Bruijn, Hago. Prezo Sm. 0.125.

Mi ne povas tro varme rekromendi ĉi tiun kanton. Sajnas, ke la komponinto plene kaptis kaj reproduktis en la muziko la majeston kaj gajon de la poemo. Mi esperas, ke ĉi tiu kanto, kiu cetere estas tute simpla, pli ofte aŭdiĝos (kion ĝi ja meritas), aŭ kiel solo, aŭ kiel horajo, en niaj kunvenoj kaj kongresoj. La instrumentisto facile provizos ellasitan naturigilon por la B (B flat) en mezuroj 10 kaj 11.—M.C.B.

La Espero.—Vortoj de Zamenhof, muziko de Thomas J. Relf. Prezo du pencoj (8 sd.) afrankite, ĉe la komponinto, 5, King's-terrace, Edgware.

Ankoraŭ nova muzikajo por la konata poemo, tute plaĉa kaj malkara.

La komponinto pardonu, se bedaŭron mi esprimos, ke li ne elektis aliajn vortojn por enmuzikigo. Kredeble ĉiu malnova Esperantisto jam posedas dekon aŭ pli da muzikajoj por "La Espero." Samtempe, ekzistas multego da poemoj en nia literaturo kiuj bonege taŭgas por kantiĝo, sed kiujn oni ŝajne plene maltentas. Ekzemplojn oni trovos abunde, interalie, en "Unuaj Agordoj" de Elski kaj Eska, aŭ en la "Verkaro" de Devyatnin. Mi persone opinias, ke neniu ĝis nun aperinta muzikigo de nia himno estas komparebla kun tiu de A. Motteau (nun, bedaŭrinde, preskaŭ forgesita—la muziko, ne la viro). Sed la melodio de F. de Menil estas nun longe akceptita kiel la kvazaŭoficiala, kaj tia ĝi kredeble restos, kun ĉiuj siaj meritoj aŭ malmeritoj. Pro tio, mi forte konsilas al la muzikistoj, ke ili turnu sian atenton al aliaj tekstoj. "La Espero" ja ne estas la sola poemo en Esperanto! —M.C.B.



Neutrala Laboro dum la Milito.

En Kopenhago starigis antaŭ kelka tempo oficejo por "Konservado de internacia kunlaboro." La iniciantoj estas "La Pac-Unuiĝo," "La Nacia Konsilantaro de Danaj Virinoj," kaj "La Asocio de l' Virinaj Unuiĝoj, Komitato por Elektrajto."

La ideo pri starigo de tia oficejo devenas de la holanda "Kontraŭ-Milita Unuiĝo," al kiu jam aliĝis ĉ. 300 societoj kaj 9,000 izolitaj personoj.

La Kopenhaga oficejo elsendis alvokon, subskribitan de 23 bonaj danaj nomoj, i.a. S-ro H. Ostenfeld, la episkopo de Selando, S-ro Frederik Bajer, honora prezidato de la internacia jacobicejo, la universitataj profesoroj S-roj Otto Jespersen, Carl Torp kaj Harald Westergaard, S-ro advokato, parlamentano Niels Petersen, prezidanto de "Dana Pac-Unuiĝo," S-ro H. J. Hannover, direktoro de la politeknika lernejo, S-ro H. Voss, prezidanto de la dana grandloĝio de

I.O.G.T., S-ro F. Baruēl, prezidanto de Societoj de Danaj Esperantistoj, k.t.p.

La elsendita alvoko precipi sin turnas al la anoj, memorigante al ili, ke ili kiel anoj de neŭtrala ŝtato ŝirmitaj kontraŭ la terurajoj de la milito, tamen ne devas indiferente rigardi la dramon, kiu estas ludata antaŭ iliaj okuloj, sed memori, ke la cirkonstancoj kreas specialajn devojn kaj taskojn, kiuj estas solveblaj nur de neŭtrala nacio.

Diversaj societoj sekve de la alvoko jam aliĝis kiel apogantoj de la oficejo; inter ili troviĝas krom la suprenomitaj: La junula Pac-societo "Pax," "Societoj de Danaj Esperantistoj," "Dana Ido-Federacio," "Kristana Mond-Unuiĝo," "la dana Komitato," "Kristana Pac-Unuiĝo," "Abstinencia Unuiĝo de l' Dana Studanta Junularo," "Dana Grandloĝio de I.O.G.T."

La provizora programo de la oficejo estas la jena:—

I. Konservado de l'interrilato de la internaciaj organizoj.

II. Prizorgo de sciigoj pri kaj serĉado de civilaj personoj dum la milito,

III. Respondado de demandoj kaj disvastigoj de sciigoj pri internacia pac-laboro.

La alvoko cetere priparolas la neceson de l' konservado de la internacia vivo kaj interrilatoj, sed ne dubas, pri tio, ke en la militantoj landoj la laboro nur malfacile estos daŭrigata nun kaj eble dum la unuaj jaroj post la milito; tial ĝi oferas sian peron en okazo de bezono, ne nur laŭ la supre skizita programo, sed en ĉiuj cirkonstancoj, kiuj ne kaŭzas konflikton kun la neŭtraleco de la dana ŝtato.

Ekz. multaj internaciaj movadoj havas sidejon en la militantaj landoj kaj pro tio nur malfacile interrilatas kun eksterlandaj fakoj; tial estas konsilinde al ili provizore ŝanĝi la sidejon. En tiaj okazoj la Kopenhaga oficejo oferas sian helpon je la arango.

Car neŭtrala lando estas pli oportuna por kongresoj dum la milito kaj eble ankaŭ poste, la oficejo volonte estos peranto tiarilate.

La adreso de la oficejo estas:—

Bureau for Opretholdelse af Internationalt Samarbejde,

Vester Voldgade 8,
Kopenhago B.

Kiel supre montrita la "Societo de Danaj Esperantistoj" ankaŭ aliĝis kaj proponis sian helpon pere de nia lingvo.

Ni inter alie promesis pere de Esperanto konatigi la oficejon kaj ĝian celon al aliaj landoj, kaj tial ni turnas nin al niaj samideanoj en ĉiuj landoj kun la peto, ke ili represu ĉi-tiun artikolon en la Esperantaj gazetoj kaj poste traduku ĝin por publikigo en naciaj gazetoj; vi tiamaniere servas al la konservado de la internacia vivo, samtempe kiam vi faras propagandon por la internacia lingvo Esperanto.

Sendante la gazetojn, kiuj priparolas ĉi-tiun gravan entreprenon, al la oficejo, vi plej bone montras la taŭgecon de nia lingvo en internaciaj rilatoj. Ni tial petas vin kiel eble plej multe atentigi viajn samlandanojn pri la utilo, kiun ili povas havi de la neŭtrala oficejo, kiu volonte respondas al ĉiuj demandoj.

MARGRETHE NOLL.

Will lady here described kindly communicate with advertiser? Full explanation upon hearing. Age about 33, dark, fairly tall, foreign extraction. Independent, living near London. Knowledge of Esperanto and French, and interested in the occult. Reserved disposition. Original and broad views. Please write in confidence, "Beta," c/o B.E.A., 17, Hart street, W.C.

How to Save Soldiers' Lives.

We cannot all fight for our country, and we cannot all work at making shells, but here is War-work which both men and women can do in their own homes, and at their own hours. It is making sandbags.

Sandbags stop bullets. Sandbags are urgently wanted—millions of them.

Most people have probably seen in the illustrated papers how sandbags are used for building parapets for the trenches, and for "dug-outs." The following are extracts from letters from officers at the Front:

An Infantry Lieutenant writes:—"We want a tremendous lot of sandbags. Our division alone has been using a million a month. For our battalion alone we usually require about 2,000 a day for the present trenches. But we have not been able to get them in sufficient quantities lately. If you saw a shell burst on a parapet with sandbags, and on one without, you would soon see how many lives they save."

A Colonel, R.F.A., writes:—"We must have hundreds of millions of sandbags in use, and we always want them. A mile of trenches will require perhaps 100,000; and each little post, observation station, or shelter of any kind behind those trenches requires many more. When we advance we have not time to empty our old sandbags and carry them on; we require fresh ones."

A Captain, R.F.A., describing the way in which infantry advance, says that each man takes ten empty sandbags under his arms as he runs out. "The men will do almost anything if only they can have enough sandbags."

The supply required is endless.

They are quickly, easily, and inexpensively made. No fine needlework is required; only coarse, strong stitching with string or seamen's sewing yarn; anyone can do it. There is a standard size; simple, clear directions are supplied. The material is "Hessian" (jute), sold by ordinary drapers for domestic purposes. Each bag requires rather less than a square yard of material, costing about 6d. (or less when bought in quantity); the bag is provided with a string, with which the soldier ties up the neck when he has filled it with earth.

By co-operation great results can be achieved. A lady, writing from a country rectory, tells me that they have sent over 1,000 bags from two small villages.

I ask for the help of all British Esperantists in this good work; I ask the hon. sec. of every affiliated group in the Kingdom to call the attention of the members to this article at their next meeting. If each member would spend only 1s. for material, and make two bags, the result would be a goodly number. But many, I hope, would be able and willing to make more; some members could well afford to present a quantity of material to their groups, to be divided amongst those whose willingness to work exceeds the purchasing power of their purses.

Every bag you make will help to stop the enemy's bullets; every bag you make may save the life of one of our gallant soldiers.

On receipt of a stamped and addressed envelope I will send a small sample of the material and of the stitching, with dimensions and instructions, and the address in London to which bags should be sent (where they are inspected and despatched to the Front without delay).

CHARLES E. COWPER,
8, Sandown Terrace, Deal.

British Esperantists serving in the Army, Navy, or Red Cross.

FIFTH LIST.

- BARHAM, R., M.B.E.A., Royal Navy.
 CLARK, A., Emmanuel Group, Camberwell, London Scottish.
 CLELOW, F. G., Birmingham Group, Corporal, R.A.M.C.
 DOCKER, C., Emmanuel Group, Camberwell, Army Service Corps, M.T.
 GREGORY, J. E., Mexborough Group, R.F.A., Rotherham Howitzer Brigade.
 HALL, GEO. W., ——— Group, 2nd Lieutenant, 11th York and Lancs. Regiment.
 HERD, ELI, Todmorden Group, R.F.A.
 HOOPER, H. H., Emmanuel Group, Camberwell, 1/21st County of London.
 KEARTON, JOHN, ——— Group, Sergeant, 9th Durham Light Infantry.
 LINDSLEY, J., Army Service Corps.
 MARTIN, G. R., Emmanuel Group, Camberwell.
 MORROW, C., Wood Green Group, Rifleman, London Regiment.
 PETHERBRIDGE, A. J., Emmanuel Group, Camberwell, 3/21st County of London.
 SHELDRAKE, B. W., Emmanuel Group, Camberwell.
 SILVERHOOD, C., Mexborough Group, R.F.A., Rotherham Howitzer Brigade.
 THOMSON, W. E., Bexley Heath Group, 17th Kent V.A.D., Red Cross.
 WELLINGTON, D. L., Private, 1/23rd London Regiment, T.F., B.E.F., France, wounded during May.
 WOOD, SAM, Todmorden Group, Gunner, R.F.A.



Examination of the London Chamber of Commerce, 1915.

JUNIOR.

- **Allen, D., *Calvert, J., *aCheetham, E., **Clifford, L., *Gardner, H. T., **Hawling, H. H., *Jones, A. A., **Lavery, B. M., *Mellor, L. W., Parker, G. H., Payne, I., Peace, H. J., **Read, B., **Silcox, L. C., **Tanner, J., *aTanner, M. E., Taylor, N. L. T., *Young, W. A.

SENIOR.

- **Browne, G. L., **Faraker, F. C., **Johnston, H., *Lawton, H., **Phipps, W. G., *Sentance, G. C.

TEACHERS' DIPLOMA.

- **Allsop, E. A., **Garnick, F. S., *Taylor, S. H.

* Denotes distinction.

*a Denotes distinction in *viva-voce* portion.

** Denotes distinction in both written and *viva-voce* portions.



FIANCIGO.

S-ro J. A. Ho'ges, F.B.E.A., Thames High School (antaue el Nottingham kaj iama Sek. de U.E.A., Genève), kun Fraǔlino Mary Whitehouse, el Thames, Nova Zelando.

EDZIGO.

La 12an de Junio S-ro G. A. C. Badham, el Rich mond, kun F-ino Ethel Ellis Bemrose. Nuna adreso: "Colgate," Sherwood Park-road, Sutton, Surrey.

Ce la Subakvigo de la Vaporipo "Lusitania."

Sperto de Esperantisto.

De FRANK H. SWEET.

Mia celo estis la Oka Brita Kongreso en Bath, do, por atingi Anglujon en bona tempo por partopreni en la kongreso, mi aranĝis forlasi Novjorkon per la *Lusitania*. Jam mi estis aranĝinta vojaĝi Eŭropon por pasigilibertempoj per transatlantikulo, kiu forlasus Novjorkon la 22an de Majo, sed kiam alvenis la Aprila numero de la BRITISH ESPERANTIST kaj mi legis pri la okazonta kongreso, mi tuj decidis, se iel eble, aliigi miajn vojaĝaranĝojn, forlasi Toronto'n pli frue kaj ĉeesti la kongreson. La ŝipagento afable aranĝis, ke mi vojaĝu sur la *Lusitania*, kiu estis je tiu tempo, pro la milito, la plej granda kaj plej rapida vaporipo veturnanta inter Usono kaj Anglujo.

La 29an de Aprilo miforlasis Toronto'n, atingis Novjorkon, kaj la 1an de Majo je la oka horo matene troviĝas ĉe la kajo, kie staras la *Lusitania*. Jam multaj pasaĝeroj ĉeestas, rimarkindaj estis la bruego kaj movado. Post stampo de valizoj, kofroj, k.t.p., oni suriras la ŝipon. Tuj post mia alveno sur la ŝipo min salutis sinjoro, kiu rimarkis mian verdan stelon. Li bedaŭre ne parolas nian lingvon sed bone scias la signifon de la sorĉa insigneto, kiun mi portadas ĉe la vesto.

Granda nombro da vojaĝantoj vidiĝas sur la diversaj ferdekoj, ili staras ĉe oportunaj lokoj apud la relbariloj. Sur la kajo estas granda popolamaso, kiu ĉeestas por adiaŭi kaj deziri bonvojaĝon al siaj geamikoj. Oni kantas, ridas, ŝercas, elkrias reciprokajn bondezirojn, kaj flirtigas flagojn britajn kaj Usonajn. Feliĉaj ŝajnas ĉiuj. Kiu ekpensis, ke efektive post unu semajno la plimulto de tiu vojaĝantaro estos kadavroj, kaj ke la *Lusitania* kušos sur la fundo de la Atlantiko?

Famo rondiris en Toronto, ke sur la *Lusitania* estis munitaj kanonoj kaj, ke la maristoj de la ŝipo estis lertaj kanonisto. Ĉirkaŭrigardante la ferdekon oni ne vidas eĉ unu kanonon nek paflon ian. Aperis en la jurnaloj Novjorkaj, oni diras, averti al Usonanoj, ke ili ne vojaĝu sur la *Lusitania* pro la ekzistantaj militaj kondiĉoj, sed nenia tia averti, mi kredas, aperis en la jurnaloj de Toronto por averti la britojn. Neniu ĉeestis la kajon por sciigi al la pasaĝeroj pri ia ebla dumvojaĝa dangero. Ĉio fariĝis tiel, kiel dum pacaj tempoj.

Proksimume je la tagmezo, sentiĝas vibretado, jam oni funkciigas la mašinaron, la ŝipo estas liberigita, grade ĝi foriras de la kajo kaj troviĝas sur la rivero; oni maren direktis ĝin. La pasaĝeroj kaj la homamaso sur la kajo inter-

ſangas finajn adiaŭojn kaj bondezirojn; jam la *Lusitania* komencas sian finan kaj fatalan vojaĝon.

* * * * *

Ses tagoj forpasas. Ĝis nun la vojaĝo trans la Atlantikon estas preskaŭ perfekta, la klimataj kondiĉoj belegaj. Apenaŭ unu ondo vidiĝas; la supro de la maro estas tiel trankvila kiel lageto; por ĉiuj la vojaĝo estas agrabla, kelkaj marmalsanetis dum la unuaj tagoj sed nun troviĝas en bona sano. Oni sin plezurigas per diversaj sportoj kaj ferdekludoj; en la salono koncertoj estas aranĝitaj—efektive ĉiuj amuziĝis.

Alvenas la fatala tago; matene la *Lusitania* troviĝas en densa nebulo, ĉiuminute la bruigiloj estas sonorigataj. Inter la pasaĝeroj okazas iom da ekscitiĝo; famo rondiras, ke la ŝipestro ricevis depeŝon senfadenan el Londono por averti, ke malamika submaripo estas proksime, kaj, laŭ la famo, eble la ŝipestro estos ordonata revenigi la ŝipon kun ĉia rapideco al Novjorko. Aliaj diris, ke la ŝipo eniros alian havenon anstataŭ Liverpool, sed kiun oni ne scias.

Kelkaj vojaĝantoj ja timas, ke eble la ŝipo estos la celo de atako per submaripo. La lastan nokton multaj ne enlitigis sed ripozis en la kajuto, tutvestitaj, pretaj por ia malfeliĉa okazo; multaj ne intencas enlitigi la venontan nokton.

Iom antaŭ la deka, matene, la nebulo levigas, lasante belegan veteron. La radioj de la suno rebrilas sur la maro similigante ĝin al fluida argento. Superkape la ĉielo estas mirinde blua, interpunktita per malgrandaj blankaj nubetoj. Ĉe la horizonto vidiĝas velŝipo, kies blankaj veloj rebriladas pro la sunradioj. Ĉio por ni sur la *Lusitania* estas belega; ĉio aspektas tiel paci, ke ŝajnas nekredeble ke terura milito bolas en la mondo.

Rigardante norden oni povas distingi la konturon de la Irlanda marbordo. Grade ĝi plividebligas, kaj je la duonhoro post la tagmezo, kiam la pasaĝeroj estis alvokataj luneti, la verdaj kampoj kaj blankaj dometoj jam estas klare videblaj.

Luncante, oni ŝercadas kaj ridetas; oni atendas esti ĉe la kajo en Liverpool post dek du horoj kaj la penso, ke baldaŭ ĉiuj troviĝos inter siaj parencoj kaj geamikoj en Anglujo, estas bona ĝojigilo por ĉiuj.

Post la lunceto multaj iras sur la ferdekon; estas preskaŭ la dua. Kune kun amiko mi promenadas sur la ferdeko kaj, haltinte ĉe la

helpdirektilejo, ni komencis konversacion kun maristo, kiu tie dejoris. Babilante ni aŭdas la sonorigon de la dua horo; kvar fojojn la sonorilo sonoras. Respondon nean mi ricevis al demando mia de la maristo, ĉu "jes" aŭ "ne" la *Lusitania* estis eskortata de britaj militshipoj, kiam ĝi laste eliris el Liverpool. Estis stranga koincido, ke la sekvanta demando estis pri ebla atako de submarshipo. "Ni ĉiam riskas" estas la respondo al mia demando pri tio, ĉu la maristoj ne timas, ke ia malfeliĉo okazos al la ŝipo.

Daŭras la interbabilado, ni diskutas diversajn aferojn, kaj pasis ĉirkaŭ tri minutoj, de kiam mi demandis pri la ebla atako de submarshipo. Subite, sen ia averta, skuego sentiĝas, bruego aŭdiĝas, kiu similas al tondro malproksima. Dum kredeble unu sekundo ni interŝanĝas rigardojn demandajn. "Kio estas," mi demandis; "Submarshipo atako," respondis la maristo, kaj ridetante li tuj forkuris por dejori ĉe savboato.

Elkurinte el la helpdirektilejo mi vidis en la aero, grandan kvanton da rubo kaj akvo. Kredante, ke kelkaj pecegoj trafois min, mi tuj rifugis en la loko, el kiu mi ĵus elvenis. Penso trakuris la kapon, ke eble la rubo falos sur la tegmenton, enrompiĝos kaj mi estos kaptita kiel fiŝo en reto. Do, denove mi eliras kaj rimarkas, ke jam la tuta rubo falis. Tuj la ŝipo ekkliniĝas, neniu ekskitiĝas, ne okazas ia paniko, ĉiuj estas aplombaj. Maristoj kuras al boatoj por fari siajn devojn, timigitaj geknaboj ĝeme ploregadas, patrinoj kuras tien kaj reen serĉante siajn infanojn.

Jam ĉe la flanko, kie la ŝipo estis atakita, oni kondukis en boatojn virinojn kaj infanojn. Ĉe la alia flanko, kiu nun estas alte en la aero, mi, kune kun aliaj penas surakvigi boaton—estas malfacila tasko pro la kliniĝo de la ŝipo. Forte ni pušas, kaj streĉas al ni la muskolojn, sed denove forta ekkliniĝo svingas la boaton forte kontraŭ ni, kaj ĉiuj estas faligitaj sur la ferdekono.

Kelke da viroj jetis sin en la maron, unu kompatindulo dronis antaŭ niaj okuloj, oni neniel povis helpi al li. Malsupren mi iras en mian kajuton por preni savilojn, kaj por tion fari, mi devis preskaŭ paſi sur la balustrado pro la pozicio de la ŝipo. Por atingi la kajuton estas necese preterpasi balkonon, kiu ĉirkaŭas super la mangōčambro. Malorda spektaklo sin prezantas al la okuloj; ĉio movebla jam estas sur la planko aŭ falas planken; mangīlaro kaj kreskajoj disjetiĝas ĉiudirekten.

En la kajuto mi trovis kvar savilojn, surmetis unu kaj atinginte la ferdekono serĉis sinjorinojn, al kiuj mankas tiaj bezonajoj. Denove enirinte la kajuton por serĉi pluajn savilojn estas tre malfacile marŝi; ĉiumomento la pozicio de la

Lusitania ŝanĝigas. Sur la ferdeko staras geedzoj junaj—ambaŭ estas tre palvizagaj—oficiro petadas la edzinon eniri boaton, sed si tute rifuzas forlasi la edzon; konjekteble estas, ke ili kune estis trafitaj de la morto. La pasejoj estas tre mallumaj, la lampoj elektraj plu ne lumas; nun neniu agas ceremonie sed eniras en ies kajuton por serĉi savilojn. Pro la mallumo oni devas palpeserĉi la deziratajn; en kelkaj kajutoj la saviloj jam estas for, tamen post serĉado mi havigis al mi ankoraŭ kvin. Por grimpi supren ĝis la ferdeko ne bezonis multe da sekundoj. Sinjoro petas savilon por sia edzino, tuj li ĝin ricevas. "Cu mankas savilo al iu sinjorino?" elkrias mi, du sinjorinoj alkuras kaj petas. Pro tio, ke ŝajne ĉiuj sinjorinoj aŭ havas savilon aŭ jam estis en boato, la du lastaj saviloj estis transdonataj al viroj. Kompreneble estis sinjorinoj, kiuj ne portis savilon, ĉar estis tute neeble atingi ilin pro la kliniĝo ĉe la ferdeko, ankaŭ preskaŭ ĉiuj sinjorino troviĝas apud la boatoj, kie la ferdeko preskaŭ tuſas la maron. Domage estas, ke tuj post la atako ĉiuj ne iris al sia propra kajuto kaj surmetis savilon, anstataŭ dependi je la boatoj. Estas nerefuteble, ke se ĉiuj estus tion farintaj, la nombro de la dronintoj estus tre malgranda.

Iu sinjoro sage enjetas en la maron multajn objektojn naĝebajn, segojn, infankalešojn, k.t.p., kiuj staras sur la ferdeko. Ĉe ĉirkaŭbarilo staras viroj palvizagaj, ili kun timo tenadas la barilon.

Proksimume dekkvin minutoj forpasis, de kiam la ŝipo ricevis la mortbaton. Oni ne povas fari ion plu por helpi en la savado, kelkaj boatoj plenaj de virinoj kaj infanoj jam estas for. Sur la maro naĝas restaĵo de boato falinta for de la boatlevilo, kiu frakasiĝis dum la falo frapinta unu el la helicoj, kiuj nun troviĝas alte el la maro. Apud enirejo de salono mi staras kaj celas la barilon ĉe la ŝipflanko, sed ekirante mi komencas gliti malsupren sur la kruta ferdeko. Ŝipano apud la flanko rimarkis mian malfacilaĵon kaj etendas al mi sian kruron, por ke mi per ĝi tiru min al la celita loko. Dum kelkaj sekundoj mi restas ĉe la flanko kaj ĉirkaŭrigardas. La spektaklo estas ja terura; homoj glitas kaj falas sur la ferdekonoj, kaj jen la *Lusitania*, sur kiu ni ĉiuj pasigis tian feliĉan vojaĝon, estas proksime al la morto; estas videble, ke baldaŭ ĝi subakviĝos.

Plua skuego decidigas min forlasi la scenon kaj grimpinte sur la barilon mi jetis min en la maron. Por mi la enakviĝo estis la plej malfagraba parto de la tuta afero, miaj nervoj ekskitiĝis. La barilo estas proksimume kvardek futoj el la maro kaj, kvankam nur bezonis malmulte da sekundoj antaŭ ol atingi la maron, ŝajnis al mi, ke mi neniam enmariĝos. Plaŭdego,

bruego, mallumo, mi estas sub la maro. Kiam mi atingas la supron de la maro, mi troviĝas inter amaso da rubaro kaj baraktantaj homaroj. Iom antaŭ mi estas boato supro malsupre, sur kiu jam staras homoj. Post dudek minutoj mi naĝe atingas la boaton kaj per helpo de junulo surgrimpas. "Kie estas la *Lusitania*?" mi demandas kun miro al la junulo, kiu, mi nun rimarkas, estas ŝipano. Li rigardis emocie al granda areo da ŝaŭmo. "Jam ĝi estas sub la maro" respondis li mallaŭte.

Ĉirkaŭe estas homoj, ŝranketoj kaj frakasitaj boatoj naĝantaj sur la maro. La kriegado de tiuj, kiuj batalas kontraŭ la morto, estas terura, naŭza.

Virino naĝas proksime al la boato, sur kiu ni staras; ni ŝin altiras sur ĝin. Sango fluadas el granda vundo ĉe ŝia frunto; per naztukoj ni faras nian eblon bandaĝi la vundon. Nun apudigas viro, kiu baraktegas; la savzono, kiun li portas, estas alligita per nur unu ŝnureto, ŝajne ke li nepre dronus—li venas sufiĉe apuden, per ke oni tenu kaj tiru lin sur la boaton. Estas klare rimarkeble ke li estas ellacigita, ke la vivo estas preskaŭ for, apenaŭ li spiras. Kelkajn minutojn ni penas respirigi lin, sed bedaŭrinde, dum ni tion faras, li ĝemetas kaj lia animo foriras al alia mondo. Neniel povis ni refunkciigi al li la koron. Kadavro de infano naĝas kontraŭ la boato, maristo elprenas ĝin el la maro. La okuloj de la infano estas duonfermitaj, ili kvazaŭ ridete rigardas al ni. Troviĝas sur la renversita boato dek unu viroj, kvar virinoj kaj du kadavroj. Konsiderante la cirkonstancojn, la virinoj agas tre kurage. Malproksime ĉe la sudo granda vaporŝipo estas videbla; ni senĉese svingas la brakojn por altiri la atenton de ĝiaj oficiroj sed estas neutile, la ŝipo antaŭeniras kaj malaperas. Stangon ni levas, sur kies supro estis metita vesto kaj savzono por altiri la atenton de preterpasantaj ŝipoj.

Ĉie kadavroj estas vidataj—la kriego daŭras. Virinoj histerie kriegas, helppetoj aŭdiĝas ankaŭ la kortuša plorado de infano; la ĝemado de la vunditoj malagrable sonas en la oreloj.

Malproksime for de ni jam estas kelke da boatoj plenaj de savitoj, kiuj estas marborden remataj.

Estas alia renversita boato proksime, la homoj sur ĝi kantas; la savitoj en alia boato eĉ kuraĝas danci—iu sur nia boato penas gajigi nin per muziko ludata per bušorgeno, kiun li trovas en sia poſo. Briladas la suno, la maro restas trankvila, la ĉielo estas mirinde blua; malgraŭ ĉio tio ĉi niaj dentoj kunfrapiĝas pro la malvarmo kaŭzita de niaj malsekaj vestaĵoj.

Ŝranketo naĝas, per remilo maristo ĝin altiras kaj elprenas el ĝi stanan skatolon da bisk-

vitoj. Per tranĉilo la skatolo estas malfermita kaj la biskvitoj dividitaj inter ni, kiujn ni avide mordetas por varmigi al ni la internajon.

De la marbordo aperas velboato fiŝkaptista, ĝi penas dum longa tempo atingi nin, sed la vento ne estas sufiĉe fortaj por antaŭenirigi la velboaton. Motorboato vidiĝas, kiu helpas savi la homojn.

Forpasas du horoj. Rigardante al la nor-dorienta horizonto ni vidas la fumnubojn de dekkelke da ŝipoj, kiuj rapidas por helpi al ni. Kian ĝojon nisentis je la apero de niaj savontoj—tuj ni pli feliĉigis, baldaŭ ni estos denove sur la tero firma. Rapide la helpontoj alproksimiĝas, kaj aliaj ŝipoj sin montras ĉe la horizonto. Fine apud ni estas ŝipoj diversspecaj, milit-ŝipoj britaj kaj vaporboatoj fiŝkaptistaj. Laŭte ni ĝojkrias al ili, kaj responde la maristoj kuraĝigas nin.

Antaŭ ol helpi tiujn, kiuj estas sur boatoj, la oficiroj sur la vaporŝipoj sage ĉirkaŭkrozas kaj serĉas por tiuj, kiuj estas en la maro. Post eble duono de horo ni suriras ŝipon nomita *Julia* kaj neniam forgesebla estos la afableco de tiuj britaj maristoj dejorantaj sur tiu ŝipo.

Ĉiuj estas nun transŝipigitaj, ankaŭ la kadavroj, kaj post tri horoj ni surteriĝas en Queenstown, kies enloĝantoj kolektiĝas grandamase por observi nian albordiĝon. Tuj post la surteriĝo, oni kondukis nin en oficejon, de kie ni forsendis depesojn kablajn al niaj amikoj por sciigi ilin pri nia savigo.

Ni iris al hotelo, kie oni donis al ni mangajojn kaj trinkajojn. En la vestiblo de la hotelo servistino donis al mi glason da "trinkajo" sed certe ĝi estis pli forta ol akvo.

La proksiman tagon estis alportata al ni vestaĵoj, kaj post vestiĝo niforlasis per vagonaro niajn afablajn Irlandanojn, kiujn ni kore dankas, irante al niaj diversaj urboj — kaj feliĉe, mi atingis mian ĉefan celon, nome la 8a Brita Kongreso en Bath.

* * * * *

Se iam scivola fiŝo penetros en la *Lusitania*, ĝi legos sur afișo, kiū estas firme pinglita sur pordo de kajuto, "Ci tie oni parolas Esperante."

La saviloj, kiujn oni provizas por la uzo de la pasaĝeroj, estas laŭforme similaj al veſtoj, ili nomiĝas la "Boddy Jacket." Ĉe la brusto estas du kusenoj, kaj unu granda kuseno ĉe la dorso. Ĉiu kuseno estas plena je korkaĵo. La ĉefaj kvalitoj de la savveſtoj estas, ke oni nur bezonas dekkelke da sekundoj por surmeti, kaj estas tute neble, ke ili moviĝu post la alligo. Estis rimarkinda fakteto, ke la plejmulto de la dronintoj, kiujn mi vidis, surhavis ordinaran savzonon — dum eble ekscitaj momentoj ili surmetis la savzonon, sed alligis ilin tro malalte sur la korpo — la rezultato estas, ke kiam ili troviĝas en la maro, la supra parto de la korpo estas subakvigita. Mi devas konfesi, ke mi ŝuldas mian vivon al la "Boddy Jacket."

Bertramo Risingham.

EL "ROKEBY" DE SIR WALTER SCOTT.

Tradukita de D. H. LAMBERT, B.A. (OXON).

KANTO I.

THE SOLDIER OF FORTUNE.

The stranger came with heavy stride :
 The morion's plumes his visage hide,
 And the buff-coat, an ample fold,
 Mantles his form's gigantic mould ;
 Full slender answer deigned he
 To Oswald's anxious courtesy,
 But marked, by a disdainful smile,
 He saw and scorned the pretty wile,
 When Oswald changed the torch's place,
 Anxious that on the soldier's face
 Its partial lustre might be thrown,
 To show his looks, yet hide his own.
 His guest, the while, laid low aside
 The ponderous cloak of tough bull's hide,
 And to the torch glanced broad and clear
 The corslet of a cuirassier ;
 Then from his brows the casque he drew,
 And from the dank plume dashed the dew,
 From gloves of mail relieved his hands,
 And spread them to the kindling brands,
 And, turning to the genial board,
 Without a health, or pledge, or word
 Of meet and social reverence said ;
 Deeply he d'unck, and fiercely fed,
 As free from ceremony's sway,
 As famished wolf that tears his prey.

With deep impatience, tinged with fear,
 His host beheld him gorge his cheer,
 And quaff the full carouse, that lent
 His brow a fiercer hardiment.
 Now Oswald stood a space aside,
 Now paced the room with hasty stride,
 In feverish agony to learn
 Tidings of deep and dread concern,
 Cursing each moment that his guest
 Protracted o'er his ruffian feast.
 Yet, viewing with alarm, at last,
 The end of that uncouth repast ;
 Almost he seemed their haste to rue,
 As, at his sign, his train withdrew,
 And left him with the stranger free
 To question of his mystery.
 Then did his silence long proclaim
 A struggle between fear and shame.

Much in the stranger's mien appears
 To justify suspicious fears.
 On his dark face a scorching clime,

LA RAJDRABISTO.

Majeste la strangul' enpaſis,
 Kaskplum' vizagón lian kaſis,
 Kaj lia form' senmezurega
 Kovriĝis per mantel' pezega,
 Al la Ozvalda afableco
 Respondis li kun senzorgeco,
 Kaj vidis tuj kun mokrideto,
 Kiel Ozvaldo per ruzeto
 La torĉon aliloken movis,
 Farante tiel, ke li povis
 Brili sur la trajtojn liajn
 La lumon, tamen kaſi siajn.
 La gast' demetis la mantelon
 Kovrantan buſon kaj orelon,
 Kaj pro la torč' brilante hela
 Aperis la kiraso bela ;
 La kaskon tiam li demetis,
 De l' plumoj la roserojn ĵetis,
 El ŝtalaj gantoj manojn prenis,
 Kaj antaŭ la fajrujo tenis,
 Kaj sin turnante al festeno,
 Sen vort', saluto, aŭ mieno
 Dankema, li malsoifigis,
 Kaj sovaĝe li satigis ;
 Sen pli da ĝeno en la festo
 Ol kiu ajn sovaĝa besto !

VII.

Senpacience atendadis
 Ozvaldo, dum Bertram' manĝadis,
 Kaj malplenigis la pokalon,
 Festante kvazaŭ karnavalon.
 Ozvaldo jen momente staris,
 Jen tien reen paſojn faris,
 Tre zorgoplena kaj scivola
 Pri unu nur novaĵo sola,
 Kun grincigado de la dentoj
 Plendante perdon de momentoj.
 Sed li rigardis kun riproĉo
 La finon de l' sovaĝdiboco,
 Notante preskaŭ kun avaro
 La iron de la servistaro,
 Lasantan fine lin libera
 Sciiĝi pri l' afer' mistera.
 Kaj tiam lia langmutigo
 Parolis laŭte pri l' batigo,
 Per kiu tim' kun hont' miksit
 Batalis en konkurs' milita.

VIII.

Sed pri la gasto multe estis
 Pro kio suspektomo restis :
 Ĉar brunigante sunkoloro

And toil, had done the work of time,
Roughen'd the brow, the temples bared,
And sable hairs with silver shared,
Yet left—what age alone could tame—
The lip of pride, the eye of flame ;
The full-drawn lip that upward curl'd,
The eye that seemed to scorn the world,
That lip had terror never blenched ;
Ne'er in that eye had tear-drop quench'd
The flash severe of swarthy glow,
That mocked at pain and knew not woe :
Inured to danger's direst form,
Tornade and earthquake, flood and storm,
Death had he seen by sudden blow,
By wasting plague, by tortures slow,
By mine or breach, by steel or ball,
Knew all his shapes, and scorned them all.

THE CONFLAGRATION.

And where is Bertram ?—Soaring high,
The general flame ascends the sky ;
In gather'd group the soldiers gaze
Upon the broad and roaring blaze,
When, like infernal demon, sent
Red from his penal element,
To plague and to pollute the air,—
His face all gore, on fire his hair,—
Forth from the central mass of smoke
The giant form of Bertram broke !
His brandish'd sword on high he rears,
Then plunged among opposing spears :
Round his left arm his mantle truss'd,
Received and foil'd three lances' thrust :
Nor these his headlong course withheld,
Like reeds he snapped the tough ashwood.
In vain his foes around him clung ;
With matchless force aside he flung
Their boldest,—as the bull, at bay,
Tosses the ban-dogs from his way,
Through forty foes his path he made,
And safely gained the forest glade.

Lin maljunigis, kaj laboro.
Jen sulka frunt', tempi' senhara,
Kaj nigraj haroj blankšanĝitaj ;
Sed kion nur la tempo povis
Mem venki, tio jen sin trovis,
Flamanta brile la okulo,
Fiera lipo de mokulo,
Kurbante sin pro malſateco ;
Okul' ĝojega pro braveco.
Neniam timo lin tremigis,
Neniam larmo kvietigis
En la okul' la flamkoloron,
Kiu mokridis la doloron.
Hardite longe al danĝero,
Cu per mineja pulvfajrero,
Per flamsputanta paflego,
Turmento, aŭ superakvego,
Li konatiĝis kun la morto,
Per kia ajn diversa sorto,
Per malgrasiga pestmalsano,
Tertremo, glavo, uragano :
Nenia pri la mort' figuro
Lin ektremigis pro teruro.

KANTO V.

XXXVI.

LA FLAMADO.

Sed kie trovas sin Bertramo ?
Dum kreskas la impona flamo,
La soldataro kunstaranta
Miregas je la fajr' bruanta ;
Jen, kvazaŭ vera ĉefdemono,
Sendit' intenca pro malbono,
Por porti peston de l' infero
Al la tutmonda atmosfero,
Kun ekbrulanta la hararo,
Kaj la vizaĝ' per sanga maro
Banita,—jen, neatendite
Aperis—mirindaĵ'—subite
El mez' de l' fumo kaj de l' flamo
La form' terura de Bertramo !
Svingante alte glavon sian
Atakis aron li alian ;
Volvante je l' maldekstra brako,
Por sin protekti en atako,—
Mantelon, li forpuŝis trion
Da lancaj pintoj (notu tion).
Sed tiuj ĉi ne lin haltigis,
La dikajn stangojn li krakigis :
Kaj vane ĉiuj atakadis,
La fortugulo deturnadis
Heroon post heroo spite
Ilia nombo ; nevenkite
Donante, akceptante vundojn,
Kiel bovviro inter hundojn
Sin jetas, tiel kontraŭstaris
Li malamikojn, ĝis li faris
Por si vojeton tra la aro
Al la ombrego de l' arbaro.

Kiel oni Forigos la Militon.

El TAGLIBRO.

Verkita de R. F. VAUGHAN, Celebes.

Hodiaŭ donis al mi grandan plezuron konsoli mian amikon X., sergenton en la 450a Reĝa Regimento de Sesfutuloj. Serĉante ĉe la kazerno, mi trovis lin, kiel ofte, en kantino, kie li legas, aŭ, pli ĝuste diri, stulte rigardas ĵurnalon. Per la vizaĝoj mi komprenis, ke ia granda konsterno frapis lin kaj same ĉiujn liajn kunulojn en la ĉambrego. Verdire, mi neniam vidis pli malgajan soldataron.

“Kion vi ĉiuj havas?” mi demandis.

“Kion ni havas?” respondis la sergento. “Ĉu vi rimarkis tion ĉi?” kaj li enmanigis al mi la ĵurnalon, montrante per tremanta fingro la jenan paragafon:

GOJIGA SCIIGO.

La Packongreso anoncas, ke la intertrakto finiĝis, kaj ke oni subskribos la novan internacian interkonsenton post intertempo kiel eble plej mallonga.

Ne necese klarigi al niaj legantoj, ke jen, post longa atendado, la forigo de la milito! Sur pĝ. 4 troviĝas anoncoj pri la aranĝata Tutmonda Festego.

Mi atente legis tion. “Bonege,” mi diris. La sergento ekofendiĝis kaj riproĉe rigardis min.

“Kiel, bonege?” li rediris.

“Nu, certe ĉiuj ĝojegos pri tio ĉi, ĉu ne? Estas bonega afero, la plej bona, kiu iam okazis.” Sed mia milita amiko tute ne partoprenis mian entuziasmon; li restis malkontenta.

“Tiuj idiotoj do opinias, ke ili efektivigis la neefektivigeblan?” li diris kolere.

“Ni vidos,” mi respondis.

“Estas frenezajo, hontajo,”—kaj li tiel daŭrigis tre energie montri sian malaprobon.

“Sed,” mi diris, “kial vi nun tiel ekkolerigas pri tio ĉi? La Kongreso, la ĵurnaloj, la popolo pridiskutis la aferon jam du tri jarojn. Tia rezultato estis jam de longe antaŭvidebla, sed antaŭe vi neniam grumblis.”

“Certe mi sciis, ke oni ialoke kunvenis por pripolari la demandon, sed mi supozis, ke oni ŝercas.”

“Antaŭe, jes; sed, la lasta terura milito estis tro, kaj ni ne plu ŝercas pri tio ĉi.”

“Oni ne—avertis,” li plendis.

“Kio ĉargrenas vin? Via malkontento mirigas min. Vi estas bonkora, kaj tiu ĉi novajo devus ĝojigi vin. Ĉu vi ne kom-

prenas? Estas mirindaĵo, ni alproksimigas al la Miljaro, el glavo oni faros plugilbekon.”

“Kaj kion oni faros el la soldatoj?”

Nur tiam mi ekkomprenis tion, kio maltrankviligas la Sergenton X.!

“Sidiĝu,” mi diris, “kaj kune ni trinkos je la venonta por-ĉiama paco. Vi supozas, do, ke, foriginte la militon, oni forigos la armeojn?”

“Kompreneble tio sekvos.”

“Tute ne!” Sergento X. sulkis la frunton.

“Kvankam oni certe malmultigos, oni ankoraŭ konservos vin. Trankviligu, la soldatoj ankoraŭ ekzistas kaj pasigas la tempon per ekzercado kaj sportoj, kaj ornamos la stratojn kaj flirtos kun la virinoj, ĝuste kiel hodiaŭ.”

“Estus nur dece. Sed, ĉu vi estas certa pri tio—?”

“Absolute,” mi respondis; “konfidencie mi diras al vi, ke mi ricevis informon pri ĉio ĉi tio rekte de la reĝa palaco. (Mia edzino havas kuzon, kies kuzo estas kuzo aŭ alia parenco de iu, kiu fianĉiĝis kun nevino de kuiristino tiea). Do, mi parolas aŭtoritate. Miriga estas la maniero, laŭ kiu tiaj gravaj ŝtataj sekretoj eligas, malgraŭ ĉiaj antaŭzorgoj.”

“Malfacile estas kredi. Kompreneble la ceremoniaj paradoj multe plaĉas, kaj kelkaj soldatoj dise sur la stratoj vigligas, cetere la muziko—, sed pripensante la elspezojn, mi—”

“Neniel dezirante ekdiri al vi, ke, se nur por tio, armeo estus iom multekosta luksaĵo, mi devas klarigi, ke precipe por ankoraŭ alia afero oni deziras konservi vin.” Sergento X. gratis la kapon.

“Ankaŭ por decigi la palacojn kaj registarajn oficejojn?”

“Jes, sed plue por—”

“Por kio?”

“Guste por forigi la militon!” Tio ĉi silentigis mian amikon, kaj, dum kelkaj momentoj li pripensis; poste, distrite trinkinte sian bieron kaj ankaŭ mian, li diris, “Mi ne kompresas!” Repreninte mian glason kaj mendinte pluan trinkaĵon, mi daŭrigis, “Mi klarigos kiel eble plej simple. Antaŭ longe konstatiĝis, ke la arbitracio, al kiu oni antaŭe inklinis fidi, estas nur farso; ĉar se oni ne deziras militi, oni nepre interkonsentos sen ia arbitracio, sed tiam, kiam oni decidis militi, oni arbitracias nur por plifacili la mobilizadon. Do, la arbitracio ĉiaokaze neniel utilas! Anstataŭe, post nelonge, ni havos ‘Tutmondan Tribunalon’ kaj legaron por la nacioj kiel por la individuoj. Sed la nacioj propravole obeos tiajn legojn same kiel ni, la individuoj, ĉiudetale obeos niajn sen amika instigado de la polico kaj la jugistaro. Ĉu vi kom-

prenas? Tial oni baldaŭ proponos al vi anigi en 'la Honorinda Internacia Milita Polico,' kaj tiel la naciaj armeoj ensorbiĝos."

Malgraŭ la "honorinda," la serĝento neniel entuziasmiĝis, do mi rapidis aldoni, "Sed vi restos tiaj, kiaj vi estas hodiaŭ soldatoj, ĉar oni ne tiel devigus nacion kiel homon. Nur, anstataŭ por la patrujo, vi militos por la homoj; multe pli nobla tasko. Resume, oni proklamas leĝojn; se okazos malobeo, oni plendos, oni tuj detenos la ofendintan nacion, kaj esploros; poste, proceso, verdikto, se necese mon-aŭ alia puno, kaj jen vi havas!. La milito forigita!"

"Tre malfacile-arangebla afero, Sinjoro."

"Certe, malfacile arangebla, kaj se ĝi ne rilatus la balotadon kaj eĉ la reĝecon, sendube la registroj, kiel ili emas, konvinkigus ke ili solvis kaj por ĉiam forigis la problemon, konstatinte ties malfacilecon; sed vi scias kiel la homoj serioziĝis pri tiu ĉi demando, kiel oni ĉiulande antaŭenpuŝegis, eĉ ĝis ribelo, kaj fine ni atingis la celon, kiel sciigas tiu ĉi paragrafo, kiu tiom emociigis vin. Jes, sendube tre malfacila afero, sed la alpreno de internacia lingvo, la forigo de la gentaj nomoj de la landoj, la homaranismo kaj la aliaj bonegaj novaĵoj, kiujn ni lastatempe akceptis, multe helpos."

"Ĉio ĉi tio sonas tre agrable, sed mi min demandas, ĉu estus iel eble, ke oni povos efektive devigi nacion, krom per la malnova metodo? Kiel oni agus, se nacio malakceptus verdikton?"

"Vi estas tre obstina. Paroli al vi pri tiu ĉi afero estas paroli al mezepoka kavaliro pri la senfadena telegrafado, eĉ pli ĝene, ĉar kredeble tiu estus pli kredema pri la mirindajoj. Tiu nacio ĝuste similus homon police-tenatan, krom tio, ke nacio ne povas forkuri. Eble okazus vana baraktado, eĉ multaj policanoj pereus, sed ĉiuokaze la justeco fine triumfos! Oni nur havigus al ĝi pli severan punon, kaj la mondo kompate ridetus la malsagecon de la luktinto, ne ekpensinta ĝin helpi. Ne pli ol vi aŭ ni, spertiĝinta nacio emos perforte havigi al si la justecon, nek alie perforte agi. La kriego, 'La patrujo en dangero' ne ekflamigos nin kiel antaüe, ĉar ni komprenas ties valoron; plue, nacio sen armeo malfacile militos, oni povus supozи, kaj nur La Tribunalo havos armitan kaj dresitan armeon. Cetere, oni facile izolos la malobeeman nacion per efektiva blokado, ĉar ĉiuj estos kontraŭ tiu, kiu ne volas obei la pornaciajn leĝojn, ĉar tiutempe nia sendangereco dependos de la universala obeado absoluta al nia Tribunalo. Do, ŝajnas al mi, ke ni estos treege insistaj pri tio, kaj ke ni tre senkompatie kondutas al tiu, kiu minacas nin ĝeni."

Serĝento X. afable ridetis kaj diris, "Kiel bela estas la entuziasmo kaj, almenaŭ tie ĉi ĝi malutilas neniu! Ĉu vi pripensis tion, ke la policanoj, la jugistoj ne estas ĉiuj perfektaj? Iam senintence oni terure eraras. Ĉu nacion toleros?"

"Kompreneble, estas indaj kaj malindaj policanoj, ni provos akiri kiel eble plej indajn. Rilate al maljustajoj, ili eble okazos; sed, kredeble eĉ pli malofte ol ĉe la porhomaj juĝoj kaj tiuokaze, kvankam oni ne volonte toleros, supozeble, post pripenso pri la forto de la Tribunalo, tiel, kiel ĉe la homoj, oni filozofie sin kontentigus, malbenante la Tribunalon kaj ĝenerale la aferojn sublunajn, kaj esperante al estonta gajno. Ĉu vi rimarkis, ke ĝoje pro unu gajno superas malĝojon pro ses malgajnoj? Ne, neniarilate vi montris neefektivigebla tiun ĉi admirregindan projekton! Kompreneble, restas por solvi ĝi kelkaj demandoj relative negravaj, kiujn oni ankoraŭ diskutadas; iaokaze ne maltrankviliĝu. Ŝajnas al mi, ke homo kiel vi supreniros en la Internacia Polico! Per fina glutajo mi toastas, 'La porciama paco' kaj aldonas 'Vivu la la militistoj'!"

Serĝento X. ne prokrastis honori mian toaston sed tuj poste li ekkriis "Ha, jen bagatelo, pri kiu viaj saĝuloj sendube ne pripensis. Kiu, je la nomo de ĉio, kio estas heroa, riskos mortiĝi por via karega Tribunalo? Tion diru al mi." Li rigardis min triumfe.

Mi respondis severe, 'Oni riskos same kiel ĉe la policanoj. Ĉu ili sin interesas pri la denunco, aŭ pri la denuncinto; pri la nacieco de la kulpulo aŭ pri io krom arresti kaj teni? Oni senpartie plenumos sian devon, eĉ ĝis la morto. Mortiĝi por la homaro superas mortiĝi por la patrujo. Ne estas necese diri al vi, ke anigi en la Tribunalo fariĝos la plej alta honoro en la mondo. Vi ankoraŭ ne plene komprenas pri la majesteco nek la aŭtoritato de tiu Tribunalo. Ĝi estos la plej potenca monda aŭtoritato, kaj ni devos konservi ĝin la plej senpartia la plej sagaj kaj la plej repektinda."

Mi levigis por foriri kaj kore manpremante lin, mi ekkriis "Vivu la armeo!" Sed Serjento X. estas eksterordinare neesperema, ĉe la pordo li diris, "Sed mi dubas—"

"Mi, tute ne," mi gaje respondis, ekforiente."



Restadejo por Britoj en Franclando.—S-ino HENRIET-NOLOTTE, 33, St. Chabot-Charny, Dijon, skribas:—"En mia hejmo ili trovas komfortajn ĉambrojn, familiajn mangodojn, francan interparoladon, esperantian akcepton, pianon, legajojn de verkistoj malnovaj, modernaj klasikaj, fremdaj. Mi pli ŝatas samideanojn, sed ĉiuj estas kore akceptataj."

Perloj el la Esperanta Literaturo.

Janko-Muzikanto.

Noveleto de H. SIENKIEWICZ.

Tradukis A. GRABOWSKI, Varsovio.

Gi venis sur la mondon malfirma kaj malforta. La baptaninoj, kiuj sin estis kolektintaj apud la lito de la naskintino, balancadis la kapojn super la patrino kaj super la infano. La forĝistedzino Ŝimonova, kiu estis la plej saĝa, komencis konsoladi la malsanan :

"Donu—si diras—mi ekbruligos super vi la kandelon de morto ; ĉar el vi jam nenio estos, mia amikino : vi jam devas pretigadi por la alia mondo kaj venigi la pastron-bonfariston, por ke li al vi pardonu viajn pekojn. — Ba ! — diras dua — kaj la knabon oni tuj devas bapti ; li eĉ ne alatendos la bonfariston, kaj, si diras, bone estos, ke li almenaŭ ne mortu sen baptio."

Tiel parolante, si ekbruligis grandan vaksan kandelon, kaj poste, preninte la infanon, superverſis ĝin per akvo, ke ĝi komencis fermadi la okuletojn, kaj ŝi diris ankoraŭ :

"Mi vin baptas en la nomo de l' Patro kaj de l' Filo, kaj de l' Spirito Sankta, kaj donas, al vi la nomon Jan', kaj nun animo kristana iru, el kie vi venis. Amen !"

Sed la animo kristana ne havis tute la deziron iri, el kie ĝi venis, kaj forlasi la malfirman korpon ; kontraŭe, ĝi komencis batadi per la piedetoj de tiu ĉi korpo, kiel ĝi nur povis, kaj plori, kvankam tiel malforte kaj malgoje, ke, kiel diris la baptaninoj : "Oni povus pensi : katido, aŭ io alia !"

Oni sendis venigi la pastron ; li alveturis, faris la sian kaj forveturis : al la malsanulino fariĝis pli bone. Post semajno la virino eliris al la laboro. La knabeto apenaŭ "spiretadis" sed li spiretadis, ĝis en la kvara jaro je l' printempo la kukolo superkukolis la malsanon, tial li pliboniĝis kaj en suferebla sano atingis la dekan jaron de l' vivo.

Malgrasa li estis ĉiam kaj bruligita de suno, kun ventro elblovita kaj enfalintaj vangoj ; li havis harojn lumajn, preskaŭ blankajn, kiuj faladis sur la lumajn, large malfermitajn okulojn, rigardantajn la mondon, kiel se ili rigardus en nemezureblan malproksimon. En la vintro li sidadis post la forno kaj ploretadis mallaŭte pro malvarmo kaj iafoge pro malsato, kiam la patrineto nenion havis por meti nek en la fornon nek en la poton ; en somero li iradis en ĉemizeto ĉirkaŭligita per randeto de ŝtofo kaj en pajla ĉapelo, sub kies ŝirita tegmenteto li elrigardadis, levante kiel birdo la kapon. La patrino, malriĉa vilaĝanino,

vivanta tagon post tago kiel hirundo sub malpropra pajla tegmento, eble lin amisiaspece, sed ŝi batadis lin sufice ofte kaj nomadis "sentaŭgulo." En la oka jaro li iradis jam kiel garda knabo post la bruto, aŭ, se en la domo nenio estis por manĝi — kolekti fungojn en la arbaro. Ke lin tie iam lupo ne manĝis, estis nur kompato de Dio.

Li estis knabo malsprita kaj kiel la vilaĝaj infanoj, ĉe la parolado kun homoj, metanta fingron en la bušon. La homoj eĉ ne promesis al si, ke li vivos, kaj ankoraŭ malpli, ke la patrino povus alatendi konsolon el li, ĉar ankaŭ por la laboro li estis mallerta. Oni ne sciis, el kie li venis tia sur la mondon ; sed por unu afero li estis pli avida, tio ĉi estas por la muziko. Cie li ankaŭ ĝin aŭdis, kaj kiam li nur iom elkreskis, tiam li jam pri nenio alia pensis. Li iras, ekzemple, en la arbaron post la bruto aŭ kun la dupoto por kolekti fragojn, tiam li revenas sen fragoj kaj diras :

"Patrineto ! en la arbaro tiel io ludis ! Oj ! Oj !"

Kaj la patrino respondas :

"Mi ekludos al vi, ekludos ! ne timu !"

Kaj iafoge ŝi faris al li muzikon per ligna kulerego. La knabo kriis, promesadis, ke li jam tion ne faros, sed tamen li pensis, ke tie en la arbaro io ludis... Kio ? ĉu li sciis ?... La pinoj, fagoj, betuloj, orioloj, ĉio ludis : per unu vorto, tutu l' arbaro !...

La echo ankaŭ... En la kampo ludis al li la artemizio, en la ĝardeneto apud la domo pepadis la paseroj, ke la ĉerizujoj tremis ! En vesperoj li aŭskultadis ĉiujn voĉojn, kiuj estas en la vilaĝo kaj kredeble pensis al si, ke la tutu vilaĝo ludas. Kiam oni lin sendis al la laboro, por ke li disjetadu la sterkon, eĉ la vento ludis al li en la forkego.

Tiel ekvidis lin unu fojon la laborestro, starantan kun disjetitaj haroj kaj aŭskultantan la venton en ligna forkego... ekvidis, kaj deliginte la rimenon, donis al li bonan memorajon. Sed kion tio ĉi utilis ! La homoj nomis lin "Janko-muzikanto" !... En printempo li forkuradis el la domo por fari fajfilojn ĉe la rivereto. En noktoj, kiam la ranoj komencis kvakadi, la ortikoj* sur la herbejoj triladi, la ardeo super la roso bruadi, kiam la kokoj kantis post la bariloj, li ne povis dormi, li nur aŭskultis, kaj Dio sola scias, kian muzikon li ĉiam aŭdis. En la preĝejon la patrino lin ne povis preni, ĉar kiam ektondras la orgenoj, aŭ kiam oni ekkantas per dolĉa voĉo, al la infano la okuloj tiel sin kovras per nebulo, kiel se ili jam ne, rigardus el tiu ĉi mondo...

* ? Quail

La nokta gardisto, kiu iradis tra la vilaĝo kaj, por ne ekdormi, kalkuladis la stelojn sur la ĉielo aŭ paroladis mallaŭte kun la hundoj, vidis ofte la blankan ĉemizeton de Janko, transkurantan en la nullumo al la vilaĝa gastejo. Sed la knabo ne iradis en la gastejon, nur apud la gastejon. Tie sidiĝinte ĉe la muro li aŭskultadis. La homoj dancis la "obertason" iafoge ia juna vilaĝano ekkriis: "U—ha!" Estis aŭdata la frapado de botoj aŭ la voĉoj de knabinoj: "Kio?" La violonoj kantadis mallaŭte: "Venis ili, ni kun ili: mangi, trinki kaj babili" kaj la violono-baso per profunda voĉo akompanadis: "Donu Di! Donu Di!" La fenestroj brulis de lumo kaj ĉiu ligna kolono en la gastejo ŝajnis tremi, kanti kaj ludi, kaj Janko aŭskultis!...

Kion li donus por tio, se li povus havi tian violonon ludantan delikate: "Venis ili, ni kun ili: mangi, trinki kaj babili!" Tiajn tabuletojn kantantajn! Ba! sed kie ĝin ricevi, kie oni faras ilin? Se oni almenaŭ permesus al li eĉ unu fojon preni en la manon ion similan!... Ne! Permesita estis al li nur aŭskulti, tial ankaŭ li aŭskultis kutime tiel longe, ĝis la voĉo de la gardisto evokis post li el la nullumo:

"Ĉu vi ne iros domon, tormentulo?"

Tiam li forkuradis sur siaj nudaj piedoj la domon, kaj post li iris en la nullumajo la voĉo de la violonoj: "Venis ili, ni kun ili: man i, trinki kaj babili!" kaj la grava voĉo de la violono-baso: "Donu Di! Donu Di!"

Se li nur povis aŭdi la violonon, ĉu dum li festo de kampaj tranĉistoj, ĉu dum ia festo de edziĝo, por li jam estis tre granda festtago. Li rampis poste post la fornnon kaj ne parolis tutajn tagojn, elrigardante kiel kato per la brilantaj okuloj el la nullumo. Poste li faris mem al si violonon el tegmenta tabuleto kaj el ĉevalaj vostharoj, sed ĝi ne volis ludi tiel bele kiel la violono en la gastejo: Ĝi sonis mallaŭte, tre mallaŭtete, tute kiel iaj mušetoj aŭ kuloj. Li ludis tamen sur ĝi de l' mateno ĝis la vespero, kvankam li ricevadis por tio tiom da pušoj, ke fine li elrigardis kiel batita pomo nematura. Sed tia jam estis lia naturo. La mizera infano malgrasiĝadis ĉiam pli multe, la ventron li havis sole ĉiam grandan, la harajon ĉiam pli densan kaj la okulojn ĉiam pli large malfermitajn, kvankam la plej ofte super verŝitajn de larmoj, sed liaj vangoj kaj la brusto enfaladis al li ĉiam pli profunde, pli profunde....

Li tute ne estis kiel aliaj infanoj, li estis kiel lia violono el tegmenta tabuleto, kiu apenaŭ sonetadis. En la tempo antaŭ la kolektado el la kampo li preskaŭ mortadis pro malsato, ĉar

li vivis la plej ofte per karoto nekuirita kaj ankaŭ per la deziro posedi violonon.

Sed tiu ĉi deziro alportis al li nenion bonan.

En la palaco violonon havis la lakeo kaj ludis iam je ĝi en griza horo vespera por plaĉi al la ĉambristino. Janko iafoge subrampadis inter la grandfoliaj bardanoj,* ĝis la malfermita pordo de l' antaŭĉambro, por povи bone ĝin rigardadi. Ĝi estis pendanta sur la muro kontraŭ la pordo, tial la knabo elsendadis al ĝi tutan sian animon tra la okuloj, ĉar ŝajnas al li, ke tio ĉi estas ia sanktaĵo neatingebla por li, kiun tuŝi li estis ne inda, ke ĝi estas la plej kara lia amato. Kaj tamen li ĝin deziris. Li volus almenaŭ unu fojon havi ĝin en la mano, almenaŭ rigardi ĝin pli proksime... La malfeliĉa malgranda vilaĝana koro tremis de feliĉo ĉe tiu ĉi penso.

En certa nokto neniu estis en la antaŭĉambro. La gesinjoroj delonge estis en la alilando, la domo staris malplena, tial la lakeo sidis sur la dua flanko ĉe la ĉambristino. Janko, kaŝita en la bardanoj, rigardis jam longe tra la malfermita larĝa pordo sur la celon de ĉiuj siaj deziroj. La luno sur la ĉielo estis tiam plena kaj leviĝadis malrekte en la antaŭĉambron, tra l' fenestro, rebatante ĝin en formo de granda luma kvadrato sur la kontraŭ-kuŝanta muro. Sed tiu ĉi kvadrato proksimiĝadis malrapide al la violono, fine tute ĝin superlumis. Tiam en la nulluma profundaĵo ŝajnis, kiel se de la violonĉelo radius lumo argenta, precipe la flekso estis lumigata tiel forte, ke Janko apenaŭ povis rigardi ĝin. En tiu ĉi brilo ĉio estis bonege videbla: la entranĉitaj flankoj, la kordoj kaj la fleksita maneto. La tiriloj de kordoj ĉe ĝi lumis kiel vermetoj de l' sankta Johano, kaj longen pendis la arco en formo de stango argenta...

Ah! ĉio ĉi estis belega kaj preskaŭ magia; Janko ankaŭ rigardadis ĉiam pli avide. Sidante en la bardanoj, kun la brakoj apogitaj sur la malgrasaj genuoj, kun bušo malfermita li rigardadis. Jen timo lin retenadis sur la loko, jen ia nevenkebla deziro pušadis antaŭen. Ĉu tio estis magiaĵo, aŭ io alia?...

Sed la violono en la lumeco de tempo al tempo ŝajnis proksimiĝadi, kvazaŭ naĝi al la infano... Je momentoj ĝi estingiĝadis, por ree ekradii ankoraŭ pli forte! Artoj magiaj, videble artoj magiaj! Dume la vento ekblovis, la arboj mallaŭte ekbruis, la bardanoj ekmurmuris kaj Janko ŝajne ekaŭdis kompreneble:

"Iru, Janko! en la antaŭĉambro estas neniu... iru Janko!..."

La nokto estis klara kaj luma. En la palaca

* Fr.: bardane, burdock.

gardeno apud la lageto la najtingalo komencis kanti kaj fajfi jen mallaŭte, jen pli laute: "Ir'u, ir'u, pren'u!" La honesta nokta korvo per mallaŭta flugo turnigis super la kapo de l' infano kaj ekvokis: "Janko, ne! ne!" Sed la nokta korvo forflugis kaj la najtingalo restis kaj la bardanoj ĉiam pli kompreneble murmuradis: "Tie neniu estas!" La violono ree ekradiis...

La mizera, malgranda, kunpremita formo malrapide kaj singarde sin movis antaŭen, kaj dum la najtingalo mallaŭtete fajfadis: "Iru, iru, prenu!"

La blanka ĉemizeto brileatis ĉiam pli proksime de l' pordo antaŭ-ĉambra. Jam ne kovras ĝin la nigraj bardanoj. Sur la porda ŝtupo de l' antaŭ-ĉambro oni aŭdas la rapidan spiradon de la malsana brusto de l' infano. Ankoraŭ minuto, la blanka ĉemizeto perdiĝis, jam nur unu nuda piedeto restas post la porda ŝtupo. Vane, nokta korvo, vi transflugas ankoraŭ unu fojon kaj vokas: "Ne! Ne!" Janko estas jam en la antaŭ-ĉambro.

Tuj laute ekkvakis la ranoj en lageto de l' ĝardeno, kiel teruritaj, sed poste ili silentiĝis. La najtingalo ĉesis fajfi, la bardanoj murmuri. Dume Janko rampadis mallaŭte kaj singarde, sed tuj lin ĉirkaŭprenis la timo. En la bardanoj li estis kiel sovaĝa besteto en la arbetaroj, kaj nun li estis kiel sovaĝa besteto en la kaptilo. Liaj movoj fariĝis rapidaj, la spirado mallonga kaj fajfanta, kaj ekster tio ĉirkaŭprenis lin la mallumo. Mallaŭta somera fulmo, transkurinte inter la oriento kaj okcidento, superlumis ankoraŭ unu fojon la internaĵon de l' antaŭ-ĉambro kaj Jankon sur la kvaroj antaŭ la violono kun kapo supren levita. Sed la fulmo estingiĝis, la lunon kovris nubeto, kaj jam nenion oni povis nek vidi nek aŭdi.

Post momento el la mallumo elvenis sono mallaŭteta kaj plora, kiel se iu negardeme ektuſetus la kordojn kaj subite...

Ia basa dormema voĉo, elvenanta el la angulo de l' antaŭ-ĉambro, ekdemandis kolere:

— Kiu tie?

Janko retenis la spiron en la brusto; sed la dikaj voĉoj demandis la duan fojon:

— Kiu tie?

Alumeto jetis sian brilon sur la muron; fariĝis lume, kaj poste... Eh! Dio! Oni aŭdas malbenojn, batojn, la ploron de infano, vokadon: "Ho! pro Dio!" la bojadon de hundoj, kuradon de lumoj sur la vitro de fenestro, bruon en la tutaj palacoj...

La duan tagon la malfeliĉa Janko staris jam antaŭ la jugo ĉe la vilaga jugisto.

Cu ili devis lin tie jugi kiel ŝteliston?... Certe. Ekrigardis lin la jugisto kaj la ĉesi-

dantoj, kiel li staris antaŭ ili kun la fingro en la bušo, kun large malfermitaj terurigitaj okuloj, malgranda, malgrasa, batita, ne scianta, kie li estas kaj kion oni volas de li?... Kiel jugi tian mizeron, kiu havas dek jarojn kaj apenaŭ staras sur la piedoj? Sendi ĝin en la malliberejon, aŭ kiel?... Oni devas ja havi iom da kompato por infanoj. Ke lin prenu la gardisto, ke li donu al li per la vergo, por ke li duan fojon ne ŝtelu, kaj finita la afero.

— Nature!

Oni vokis Stahon kiu estis la gardisto:

— Prenu lin kaj donu al li memorajon!

Staho ekbalancis sian malprudentan, bestan kapon, prenis Jankon sub la brakon kiel katidon, kaj elportis en la grenejon. Ĉu la infano ne komprenis la aferon, aŭ estis timigita, sufice ke ĝi ne eldiris eĉ unu vorton kaj nur rigardis, kiel rigardus birdo. Ĉu li scias, kion oni faros kun li? Sed kiam Staho en la grenejo distiris lin sur la tero kaj levinte la ĉemizeton forte ekbatis, tiam Janko ekkriis:

— Patrineto! kaj ĉe ĉiu ekbato de la vergo li vokis: "Patrineto! patrineto!" sed ĉiam pli mallaŭte, pli malforte, ĝis ĉe ioma ekbato la infano silentiĝis kaj ne vokis jam la patrineton...

Malfeliĉa rompita violono!...

— He, malprudenta, malbona Staho! kiu batas tiel la infanojn? Gi ja estas malgranda kaj malforta kaj ĉiam ĝi estis apenaŭ viva.

Alvenis la patrino, forprenis la knabon, sed devis ĝin porti la domon... La duan tagon Janko ne leviĝis, kaj la trian vesperon li jam mortadis trankvile sur la mizera lito sub saktola kovrilo.

La hirundoj pepadis en la ĉerizujo, kiu kreskis apud la pordo; radio de l' suno eniradis tra l' vitro de fenestro kaj superverŝadis per ora lumo la kapeton de l' infano kaj la vizaĝon, en kiu ne restis guto da sango. Tiu radio estis kiel vojo, sur kiu la malgranda animo de l' knabeto devis foriri. Bone, ke almenaŭ en la momento de l' morto ĝi foriradis sur la larga suna vojo, ĉar en la vivo ĝi iradis ja sur pikajoj. Dume la malgrasa brusto movadis sin ankoraŭ per spiro, kaj la vizaĝo de l' infano estis kiel aŭskultanta la ehojn de la vilago, kiuj eniradis tra l' malfermita fenestro. Estis vespero, tial la knabinoj revenante de l' fojno kantis: "Hoj, sur la verda herbejo!" kaj el la flanko de l' rivereto alvenadis la ludado de fajfiloj. Janko aŭskultis la lastan fojon kiel ludas la vilaoj... Sur la litkovrilo kuſis apud li la violono el tegmenta tabuleto.

Subite la vizaĝo de la mortanta infano ellumiĝis, kaj el la blankiĝantaj lipoj elvenis mallaŭta voĉeto:

— Patrineto?...

— Kion, mia filo? — respondis la patrino, kiun premadis la larmoj!...

— Patrineto! Dio donos al mi en la ĉielo veran violonon?

— Donos al vi, fileto, donos! — rediris la patrino; sed ŝi ne povis paroli pli longe, ĉar subite el ŝia malmola brusto elrompis sin la kolektita malĝojo, tial nur ĝeminte: “Ho Jezu! Jezu!” ŝi falis per la vizaĝo sur la keston kaj komencis ploregi, kiel se ŝi estus perdinta la prudenton aŭ kiel homo, kiu vidas, ke li jam ne elŝiros al la morto sian amatajon...

Kaj ŝi ne elŝiris ĝin, ĉar kiam levinte sin, ree ŝi ekrigardis la infanon, la okuloj de la malgranda muzikanto estis ankoraŭ malfermitaj, sed senmovaj kaj la vizaĝo tre grava, malluma kaj rigida! La suna radio ankaŭ foriris...

Pacon al vi Janko!

La trian tagon la gesinjoroj revenis en la palacon el Italujon kune kun la fraŭlino kaj la fraŭlo, kiu penadis pro ŝia mano. La fraŭlo diris:

— *Quel beau pays que l'Italie!*

— Kaj kia popolo de artistoj! *On heureux de chercher là-bas des talents et de les protéger...* aldonis la fraŭlino.

Super Janko bruis la betuloj...

*El la *Kondukanto kaj Antologio Internacia*. La verkinto diras en la Antaŭparolo de la nova eldono de 1904, ke la rakonto estis verkita “kiel tion ĉi montras iom la stilo, en la periodo de la lingvo Esperanto, kiam ekzistis nur la unua lernolibro, kun folia vortareto enhavanta ĉirkaŭ 900 radikojn. Dank' al tiu ĉi propreco la kolekto estas tre facile legebla kaj povas eĉ nun servi bone al la komencantaj Esperantistoj, kiu ne posedas ankoraŭ plene la lingvon. Aliaj samideanoj eble interesigos ekvidi kiaj estas la infanaj kaj knabaj trajtoj de la nuna viriganta Esperanto, tiu-paca heroo kiu almilitas la mondron kaj estas jam proksima de la lasta triumfo.”



Infanoj.

De IVAN NAJIVIN.*

El *Česky Esperantista*, 1904.

Mi tre pentadis, ke neniajn librojn mi prenis kun mi en N..., la svisan vilaĝeton, kien mi alveturis por vivi trankvile daŭre monaton. Estis varmegaj tagoj; laboro ne iris bone; en biblioteko de hotelo mi trovis nur kelke da senordigitaj kaj ĉifitaj volumoj de “*Revue des Deux Mondes*” kaj ĉirkaŭ deko da anglaj morinstruaj romanoj. Enuante, mi provis fari kelke da konatiĝoj, sed tio nur plifortigis la enuon. Miaj hotelaj kunlogantoj estis kelke da ĉieestantaj anglinoj de problema aĝo, tintantaj je malagordigita piano kaj kantantaj; plu—tri respektindaj angloj de karaktero ekstreme militema: tutajn tagojn ili legis

Daily Mail kaj poste furioze disputis pri politiko. Agrabla kontrasto al ĉi tiuj ŝovinistoj militemaj estis modesta, kvieta germana vidvino kun du filinoj: ili estis beletaj tipoj de Grethen’, naive senĉese raviĝintaj jen per montoj, tie per floretoj aŭ birdetoj. Estis ankoraŭ kelke da francoj ekstreme korektaj kaj ĝentilaj; post tagmanĝo ili sidiĝadis en ombro de granda acero, kie fumante cigarojn kaj sorbetante el negrandaj glasetoj likvorojn, ili unue interparoladis pri politiko kaj poste komencis pacan interparolon pri “pikantajoj.” Aparte de ĉiuj sin tenis ia suspektinda grafo de hispana eksterajo; lia kunvojaĝantino estis ankoraŭ pli suspektinda “nevino,” la bela brunulino kun brula ruĝo sur vangoj. Junasvedo kun revaj okuloj ofte vespere sidiĝis al fortepiano kaj bonege ludis komponaĵojn de Grieg, Sinding, Ĉajkovskij aŭ improvizis; sed apenaŭ iu estis enirinta en la salonon, la ludo tuj estis ĉesigata, kaj svedo time malaperis. Li faris neniajn konatiĝojn kaj preskaŭ la tutan tempon rampadis sur montoj.

Kaj la himnoj al Chamberlain, kaj la pikantajoj tedis min tre baldaŭ, kiel ankaŭ la neelcerpebla entuziasmo de Grethen’,—kaj la enuo denove ĉirkaŭprenis min...

Mi sidis sur mia balkono, rigardis la montojn kaj spiris per nekomparebla aero svisa... En mia animo maldiligente naskiĝadis, naĝis kaj distriĝadis neklaraj, agrablaj revoj; mi sentis tiun foreston de deziroj, kiu—oni diras—estas la feliĉo. Tia anima stato estas tre agrabla, se ĝi ne daŭras tre longe; en kontraŭa okazo ĝi naskas la enuon kaj malaperas, akompanata de plej sincera oscedado.

“Sed mi diras al ci, ke ĉevaloj ne fumas...” subite atingis min infana voĉeto.

Mi ekrigardis en ĝardenon kaj ekvidis ĉirkaŭ deko da infanoj. Ili ludis malgraŭ varmego. Ĉi tie estis angloj, francoj,unu ruso, unu Meksikano. Kolektitaj de diversaj flankoj de mondo, la infanoj tamen interkonatiĝis tra rapido, malgraŭ eĉ tio, ke plimulto da ili malbone posedis francan lingvon, kiu estis akceptita inter ili.

Malgranda George estis ĉevalo, Willy—veturigisto. Ili jam kelke da fojoj ĉirkaŭkuris la ĝardenon, kaj George jam tute eniĝis en sian rolon de ĉevalo, kiam subite iu donis al li ĉokoladan cigaredon. Komence li volis kaŝi ĝin en pošon, sed la tento estis tro forta, kaj la cigaredo aperis en la bušo. La veturigisto ekvidis ĉi tion kaj—ensorĉo de ludo momente malaperis.

“ Ĉevaloj ne fumas!... ” diris li. “ Kašu... ”

La ĉevalo intencis kontraŭdiri ion, sed evidente trovis nenion por diri, konsentante en

animo kun sia veturigisto. Ĝi minuton ŝanceligis kaj, por ne disiĝi je bongusta cigaredo, decidis ree aliformiĝi je George.

"Mi ne volas plu ludi je ĉevaloj," diris li.

Willy kun disreviga elvido komencis forpreni de li kondukilojn.

La restaj infanoj kun krio alkuris al ili.

"Ni ludu je ĉaso!" ekkriis Meksikano Rafaelito, la mirinde bela knabo de ĉirkaŭ ses jaroj.

"Bone!...bone!..."

Tuj komenciĝis prijugado, kiuj devas esti ĉasistoj, kiu besto. Mi ne povis kompreni, per kio gvidis sin la infanoj, elektinte Willy'n besto, sed evidente ili havis iajn konsiderojn, ĉar la elekto falis sur Willy'n ne subite: estis proponataj Rafaelito kaj Vasja—malgranda ruso—sed la plimulto trovis, ke ili ne taŭgas. Willy plezure konsentis esti besto, kaj la ĉasistoj kun krio ĵetigis por preni batalilojn. Post minuto ili jam reiĝis—unuj simple kun bastonoj, aliaj eĉ kun efektivaj pafiloj faritaj el lado.

"Nu, besto, kuru tien, en la arbetajojn, kaj..."

"Haltu!...haltu!... Kia besto li estos?..." interrompis Vasja.

Mallongeta silento. Ĉiuj konsideras.

"Kapro"!...diras George.

"Ne, mi ne volas esti kapro"!...respondas la "besto."

"Elefanto!...elefanto!..." ekkriis ĉiuj, sed iel ne tre konsente.

"Ne...elefanto...ne bone..." enpensiĝinte diris Koko, konsiderante ion.

"Mi estos urso!" diris Willy.

Ĉi tiu propono estis akceptita, kaj la antaŭnelonga veturigisto kun rapideco eksterordinara aliformiĝas je urso. Li penas fari teruran vizaĝon, minace murmuregas kaj ĉiun momenton li estas preta dissiri iun el la ĉasistoj. Multaj el ili jam intencas trapiki lin per pikilego sed ilia fervoro ne plaĉas al Rafaelito.

* Ivan Najivin estas junia kaj ankoraŭ malmulte sonata rusa verkisto, kies nomon oni ne trovas eĉ en klej plenaj enciklopediaj vortaroj. Tamen li estas pendube granda literatura talentulo, kies verkoj meritus la plej largan disvastigon, ĉar vice kun ĉarma ekstera formo, vice kun riĉeco de l' sujetoj kaj pentraĵoj—ili posedas grandegan internan indon, konstante memorigante la leganton pri la teruraj kaj nenormalajoj de l' vivo ĉirkaŭanta lin kaj instigante lin serioze pripensi kaj mediti ilin.

Malgraŭ la senĝojeo de plimulto de siaj rakontoj, Najivin ĉiam restas plena je kredo en proksima aliformigo kaj renovigo de l' homara vivo. Unu el lastaj liaj volumoj havas kiel epigrafon la fierajn vortojn de Em Zola: "La vérité est en marche, rien ne l' arrêtera" (La vero komencis la militron; neniu haltigos ĝin).

En la Tranceoj.

Strangaj rakontoj atingis nin en la tranĉeoj. Famaj supren-malsupren kuris tiun tricentmejlan linion, kiu etendiĝas de Svisujo ĝis la maro. Pri ili ni sciis nek la devenon nek la veron. Ili rapide venis kaj rapide foriris. Tamen mi iel rememoras eĉ la horon, kiam George Casey sin turnis al mi kun neordinara rigardo en siaj bluaj okuloj kaj demandis, ĉu mi jam vidis la Amikon de la Vunditoj.

Kaj tiam li rakontis al mi ĉion, kion li sciis. Post multaj el la furiozaj bataloj iun blankvestitulon oni vidis sin klinantan super la vunditoj. Pafistoj alpafis lin. Bomboj ĉie ĉirkaue falis. Nenio povis lin tuŝi. Li estis aŭ heroa super ĉiuj herooj, aŭ li estis io ankoraŭ pli granda. Ĉi tiu misterulo, kiun la francoj nomis la kamarado en Blanka vesto, ŝajne estis ĉie samtempe. Apud Nancy, en la Argonne, apud Soissons kaj Ypres, oni ĉie priparolis lin duonvoĉe.

Sed kelkaj ridis kaj diris, ke la tranĉeoj malbone efikas je la homaj nervoj. Mi, kiu ofte estis sufice nezorgema pri miaj diroj, ekkriis, ke por mi vidi estas kredi, kaj ke mi ne atendis ian helpon krom malamika tranĉilo, se oni min trovas tie ekstere kušantan kaj vunditan.

La sekvintan tagon la aferoj ekvigligis ĉe ĉi tiu frontero. Niaj kanonoj tondris de sunleviĝo ĝis sunsubiro, kaj denove komencis en la mateno. Je tagmezo ni ricevis ordonon kapti la tranĉeojn antaŭajn de ni. Ili estis malproksime 200 jardojn, kaj ni preskaŭ ne faris ekiron, kiam ni sciis, ke la kanonoj malsukcessis en sia pretigada laboro. Firman koron oni bezonis antaŭeniri, sed neniu homo ŝanceligis. Jam antaŭenirinte 150 jardojn ni trovis, ke plua irado estos senutila. Nia kapitano vokis al ni serĉi ŝirmejon, kaj ĝuste tiam ambaŭ miaj kruroj estis trapafitaj. Pro la indulgo de Dio mi enfalis en kavon. Supozeble mi svenis, ĉar kiam mi malfermis la okulojn mi estis tut sola. La doloro estis terura, sed mi ne kuraĝis movigi pro timo, ke la malamikoj min vidos, ĉar ili estis malproksime nur 50 jardojn, kaj mi ne atendis kompaton. Mi gojis, kiam la krepusko venis. Estis tiuj en mia propra roto, kiuj riskus ĉion en la mallumo se ili pensus, ke kamarado ankoraŭ vivas.

Noktigis, kaj baldaŭ mi aŭdis paſon, ne sinkaſan kiel mi atendis, sed kvietan kaj firman kvazaŭ nek la mallumo nek la morto povas haltigi tiujn trankvilajn piedojn. Tiel malmulte mi divenis, kio venas, ke eĉ kiam mi vidis la ekbrilon de ia blankaĵo en la mallumo, mi imagis, ke estas kamparano en blanka

kitelo, aŭ eble virino freneza. Subite kun tremeto de ĝojo aŭ de timo, mi ne scias de kiu, mi divenis, ke estas la Kamarado en Blankvesto. Kaj ĝuste je tiu momento la germanaj pafiloj ekpafis. La kugloj apenaŭ ne povis maltrafi tian alcelaĵon, ĉar li elstreĉis siajn brakojn kvazaŭ petegante, kaj poste retiris ilin, ĝis li staris kiel unu el tiuj apudvojaj krucoj, kiujn ni tiel ofte vidis, kiam ni tramarſis Francujon. Kaj li parolis. La vortoj sonis bonekonataj, sed tion, kion mi rememoras estas nur la komenco, "Ho, se nur vi scius," kaj la fino "sed nun ili estas kaſitaj for de viaj okuloj." Kaj tiam li sin klinis kaj alprenis min en siajn brakojn—min, la plej grandan viron en la regimento—kaj portis min kvazaŭ mi estas infano.

Sendube mi denove svenis, ĉar mi vekiĝis je konscio en kaverno apud rivereto, kaj la Kamarado en Blankvesto estis lavanta kaj bandaĝanta miajn vundojn. Ŝajnas sensence tion diri, ĉar efektive mi suferis terure, sed mi estis pli feliĉa je tiu momento ol laŭmemore mi iam antaŭe estis. Mi ne povas klarigi tion, sed ŝajnis kvazaŭ dum ĉiuj miaj tagoj mi nesciante atendis por ĉi tio. Tiel longe kiel tiu mano min tuſis kaj tiuj okuloj min kompatis, ŝajne mi ne plu min ĝenis pri malsano aŭ saneco, pri la vivo aŭ la morto. Kaj dum li rapide formovis ĉiun signon de sango kaj koto, mi sentis kvazaŭ mia tuta naturo estis lavata, kvazaŭ ĉion el la malpuraĵo kaj makulajo de la peko estas forironta, kaj kvazaŭ mi ankoraŭ unofoje estas infaneto.

Mi supozas, ke mi dormis, ĉar kiam mi vekiĝis ĉi tiu sento jam foriris. Mi estas homo, kaj mi volis sci, kion mi povas fari por mia amiko por helpi aŭ servi al li. Li alrigardas la rivereton, kaj liaj manoj interpremiĝis en pregado; kaj tiam mi vidis, ke li ankaŭ estas vundita. Mi povis vidi kvazaŭ kugletvundon en lia mano, kaj kiam li pregis guto da sango kolektiĝis kaj falis teren. Mi ekkriis. Mi ne povis eviti tion, ĉar tiu vundo lia ŝajnis al mi pli terurega ol io, kion ĉi tiu maldolĉa milito jam montris al mi. "Vi ankaŭ estas vundita," mi diris mallauite. Eble li min aŭdis, eble estis la mieno de mia vizago, sed li milde respondis, "Ci tiu estas malnova vundo, sed dum la lasta tempo ĝi min doloras." Kaj tiam mi malgoje rimarkis, ke la sama kruela marko estas sur liaj piedoj. Vi miros, ke mi ne pli frue eksisi. Mi mem miras. Sed estis nur kiam mi vidis Liajn piedojn, ke mi Lin konis.

"La Vivanta Kristo"—mi antaŭ kelkaj semajnoj aŭdis diri la milita pastro, sed nun mi scias, ke Li venis al mi—al mi, kiu elpuſis Lin el mia vivo dum la varmega febro de mia

juneco. Mi sopiris alparoli kaj danki Lin, sed neniu vorto venis. Kaj tiam Li leviĝis rapide kaj diris, "Kuſu ĉi tie hodiaŭ apud la akvo. Mi venos por vi morgaŭ. Mi havas laboron por vi, kaj vi ĝin faros por mi."

Post momento Li estis for; kaj atendante Lin mi ĉi tion skribas, ke mi ne perdos la rememoron pri ĝi. Mi sentas min malforta kaj soleca, kaj mia doloro pligrandiĝas, sed mi havas Lian promeson. Mi scias, ke morgaŭ Li venos por mi.

El "Life and Work," kun la permeso de la Redaktoro, tradukis W.M. HARVEY, • Edinburgo.

Propagando de Esperanto.

ALVOKO.

Al la Samideanoj de Ciu Lando, Salutojn:

Ni, la Bostonia Esperantista Societo, pro nia internacia lingvo tre deziras la helpon de ĉiuj Esperantistoj, kaj laŭe ni petas respondejn al la jenaj demandoj, aŭ iu el ili:

1. Ĉu vi povas kaj volonte donas al ni faktojn kiuj respondas al la ofta demando ĉu Esperanto jam troviĝas komerce, sociale aŭ alie helpema?
2. Kiel sukcesas via grupo, klubo aŭ asocio?
3. Per kiaj metodoj vi sukcesas la instruado de komencantoj?
4. Kiujn lernolibrojn (nacilingvajn aŭ Esperantajn) vi trovis la plej bonaj?
5. Ĉu vi havas iajn specialajn sugestiojn por la Esperanto-instruistoj?
6. Ĉu vi havas iajn proponojn por la sukcesa konduko de Esperantaj kluboj aŭ societoj, rilate al facile interparolado? al subtenado de intereso ĉeesti la kunvenojn (per ŝango de programo, k.t.p.)?
7. Kiun varb-metodon vi opinias la plej bona?

Esperante ricevi vian bonvolan respondon, ni restas,
Samcelante la via,

LA BOSTONIA ESP. SOCIETO,
503, Pierce Bldg., Boston, U.S.A.
Roger Goodland, Sek.

Esperanto Red Cross Fund.

EIGHTH LIST.

Amount brought forward (BRITISH ESPERANTIST, p. 139)	£806 16	5
Esperantujo de Fremantle (W. Australia), per		
Colin Unwin	5 0	0
Pears, P. W., South Brisbane, Australia....	1 0	0
Total at July 24	£812 16	5

Belgian Red Cross.

3, SAVOY COURT, SAVOY HOTEL, LONDON, W.C.

July 10, 1915.

DEAR SIR,

We are in receipt of your favour of the 9th inst. enclosing cheque for £10 4s. 8d., for which we beg to tender you our best thanks. Our needs are very great, and we most appreciate any contribution to our Fund, as it always means an increase of comfort for our brave wounded, who are anxious to recover as quickly as possible in order to go back to the firing line.

MARCEL DE VIGNERON.

The British Esperanto Association.

The British Esperanto Association (Inc.).

EXTRACT FROM RULES.—“If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member.”

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

WILLIAM MINCHIN, 15, Westgate-street, Gloucester; RENÉ DE SAUSSURE, 27, Lombachweg, Bern, Switzerland; Flight Commander RONALD H. KERSHAW, R.N., c/o Air Department, Admiralty, London.

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

*Miss ALICE M. HALL, *Miss CHARLOTTE H. ROEBUCK, *WILLIAM J. WILLIAMS, Mrs. R. S. NEAL, Wood Green, London, N.; Mrs. A. MARTIN, Miss GERTRUDE L. HAMBLETT, GEORGE R. MARTIN, ALBERT E. BOYCE, Palmers Green, London, N.; *CECIL V. D. POLLETT, Finsbury Park-road, N.; DAVID KING, Miss ANNIE LEWIS, *FERGUS F. JAMESON, *WM. PURDIE, Miss HELEN DUNN, Glasgow; E. V. CORDING, Eastney, Hants; *DAVID INNES, St. Helens; *JAS. T. FREEMAN, Preston, Lancs.

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

*DAVID FORSYTH, Glasgow; Miss RUTH FONSECA, Wanstead, London, N.E.; JOHN R. JACKSON, Kendal.


NEW DELEGATE COUNCILLORS.

J. BREDALL, London (Central); H. A. EPSTEIN, London (Balham).

* Denotes that the candidate has passed with distinction.



The Examinations Committee begs to announce that on Tuesday, August 17, at the offices of the Association, 17, Hart-street, London, W.C., will be held an *Examination for the Preliminary Certificate*, at 7 p.m., and on Wednesday, August 18, an *Examination for the Advanced Certificate*, at 6.30 p.m. Candidates should intimate as soon as possible their intention to be present.



Council and Executive Meetings.

Notice is hereby given that the next meeting of the Council will be held on Monday, August 16, at the Offices of the Association, 17, Hart-street, London, W.C., at 6.30 p.m., and the following meeting on Monday, September 20th, at the same place and time.

A Meeting of the Executive Committee will follow the Council Meeting.

AGENDA.

Consideration of the relegation of the duties of certain Sub-Committees to the Executive Council, the institution of a Board of Examiners, an Editorial Board, and the appointment of Literary Censors.

Financial Statement.

Consideration of the reduction in the size of, and the abolition or modification of the cover of “The British Esperantist.”

Correspondence and other Business.

Councillors unable to attend, or members who wish to express an opinion on any item in the Agenda, are invited to send in their views to me, in order that they may be submitted to the meeting.

E. A. ALLSOP, Acting Secretary.



Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

Sub tiu ĉi rubriko oni enpresas malgrandajn anoncojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses penceojn (25 spesdekojn) por trilinia enpresajo kiel sube (pli ol tri linioj po tri pencej por ĉia komencita linio); ĉiu MEMBRO de la Asocio havas la rajton fari unu enpresajon senpage. Bonvolu skribi legeble, rekte al la Redakcio.

596. **Moskovo (Ruslando).**—S-ro V. A. Plotnikov. *M. Pojanka* d. 4, kv. 17, deziras korespondadi pošt-karte kaj letere.

597. **Southport (Anglujo).**—F.-ino F. Smith, 46, Lethbridge road, deziras interŝanĝi ilustritajn po-kartojn kun hindaj, rusaj, holandaj kaj italaj samideaninoj. Ĉiam respondos.

598. **Tehran (Persujo).**—S-ro S. Resser, *Banque d'Escompte de Persé* deziras korespondadi pri religiaj vivmanieraj temoj, ankaŭ pri lokaj legendoj, superstiĉoj kaj proverboj.

599. **Liverpool (Anglujo).**—Korespondantoj de S-roj G. R. kaj R. P. Griffiths, bonvolu notu, ke ili translogigis al 12, Bawden-road, Garston, Liverpool.

Council Meeting, B.E.A.

Held at the Offices of the Association on Monday, July 19, 1915, at 6.30 p.m. Present: Messrs. J. Bredall, P. J. Cameron, H. A. Epstein, Harrison Hill, W. H. Hirst, G. Mercer Hollis, A. Morrow, R. Robertson, C. S. Schleich, F. M. Sexton, S. H. Taylor, Dr. John Pollen, Misses E. A. Lawrence, E. O'Brien. In Attendance: Mr. E. A. Millidge, Mr. A. E. Wackrill, the Acting Secretary.

Death of S-ro Emile Boirac.—Dr. Pollen read a letter from Rektoro E. Boirac, in which he announced the death of his second son, Lieut. E. Boirac, who was mortally wounded in the trenches at Bois d'Ailly on May 15, while gallantly holding out against the enemy. Dr. Pollen also read his reply, expressing deep regret and sympathy on behalf of Mrs. Pollen and himself, and the Esperantists of Great Britain and Ireland.

It was resolved that the Council of the British Esperanto Association tender to Rector Boirac and Madame Boirac its deepest sympathy with them in the irreparable loss of their gallant son, and place on record their admiration for the noble death he died on the battlefield.

Ninth British Esperanto Congress.—A letter was read from the York Esperanto Society asking the Council to defer any decision as to the place of the next Annual General Meeting, in view of a possible invitation to their city.

As no invitation had been received, the matter remained open, according to the decision of the June Council Meeting.



B.E.A. Guarantors, 1915.

Amount brought forward (BRITISH ESPERANTIST, p. 140)	£5310
Curry, Rev. A. L., Allerton Bywater	10
Higgins, Miss C. M., London, S.E.	10
Lockington, A. H., Bristol	10

Total at July 24 £5340



Convalescent Home Fund.

Amount brought forward (BRITISH ESPERANTIST, p. 139)	£0 10 6
Dinslage, J. F., Herongate	5 5 0
Fyson, Miss E., Taunton (omitted from June list)	1 1 0
Mould, Miss E., W. St. Leonards	0 10 0
Gossling, Miss L., Wisbeach	0 5 0

Total at July 26 £7 11 6

*See BRITISH ESPERANTIST, June, p. 109.



600. Harderwijk (Kamp) Holando.

S-ro Arthur Diels, belga internigita soldato, Lođejo 5, deziras korespondadi kun alilandanoj. Ĉiam respondos.

601. Harderwyck (Holando).

S-ro Josefo Van den Brande, Baraque 34, kaj S-ro René Schoenmakers, Baraque 5, internigita belgaj soldatoj, deziras korespondi kun samideanoj alilandaj.

602. London (Anglujo).

S-ro E. J. Annison, 7, Cavendish Buildings, Cavendish-square, W., deziras interŝanĝi ilustritajn pošt-kartojn kaj poštmarkojn kun ĉiulandanoj. Ĉiam respondos. Afiksu poštmarkojn bildflanke. Bonvole skribu vian adreson tre klare.